

ARNE GARBORG (1851–1924)

LA MONTARINO

la poemaro pri **Veslemey**,

aŭ

Injeto, la **vizianto**.

(1895)

Tradukis: *Odd Tangerud*

en kunlaboro kun

Anja Karkiainen.

Prologo

Al vi, vi pala marĉa ej'kun meniant',arde', pluvi' sur erikej',jen mia kant'.

Eriko velka sur dekliv'de sonĝa mont',al vi mi kantas pri la viv'en sombra
mond'.

*

Vi trola mond', mi konas vin,vi nokt' en tim'!Se fuĝas mi, vi hantas minen la
anim'.

Mi konas vin, vi ŝaŭm-resalt'kun sorĉ-murmur';vekiĝas ade kaj sen halt'en
brust' terur'.

La lukton pezan konas mien trol-batal'.Rompitaj ostoj! Helpu Di'!Ho, kia fal'!

*

Mi konas vin — mi konas vin, ne venkis vi! — La lukton laŭ la voj' al fin', ĝin vidis mi.

En lukt' baraktis ankaŭ midum jar' post jar', kun kurba dors', kuraĝ-defi', kun vunda ar'.

Vi ĉe mi ŝvebas, sidas ĉekun via tim'! En mi vekiĝas ade ve'en la anim'.

Pri forta volo, trol-turment'ja scias mi; minora kant', boat', torent', sufoka kri'. —

*

Alaŭd' ekŝvebas de l' tombej'kun venko-tril'; freŝiĝas hom' kaj ĉiu ej'per vent' kaj bril'.

Kaj eĉ se ploron spertu nien la terur', al la alaŭdo fidu ni, printemp-aŭgur'.

HEJME

Injeto ĉe la ŝpinilo

Aŭtunas. Veteraĉokun pluv' kaj venta frid'! De bird' fenestren klako. Enven'? Ho vana fid'! Sed sub la bona forn'jen sur la tola sakomaljuna «Mons» en dorm'.

Jen kuŝas ĝi sonĝantekun straba okulum', kaj ĉion forgesante; ĝuindas nun varmum'. Nenion diras ĝi, aspekte sin kaŝantekun vosto ĉirkaŭ si.

Jen kiel silkobuloĝi kuŝas en la fel', mien' de dormemulo, sen ungoj por krue! Senzorga rigardet'elglimas el okulokun svaga ronronet'.

*

Ĉu foren vi vagadasen viaj sonĝoj nun? Ĉu eble nur dormadasla pensoj en mallum', aŭ el la pasintec'la bildoj ariĝadasde l' tempo de princec'.

Plej bela princ' de l' mondovi iris en l' arbar', sur ŝultroj or-har-ondo, kaj viglis temerar'en loga konsider'pri in' plukanta berojn sur ejo ĉe river'.

Sed venis sorĉistinoel hejmo de trolin'; kaj volis, flatulino, ke l' princo amu ŝin. Li saltis en malŝat'. Eksorĉis la trolino, kaj ŝanĝis lin al kat'.

Li poste migri provastrans mont' kaj arbustej' kaj fine vojon trovasal nia hejma ej'. En pac' ĝis vivofin' ripozi li nun povasen rev' pri sia in'.

Ho — hu! La veteraĉokun pluv' kaj venta frid'! De bird' fenestren klakopetanta pri invit'. Sed sub la bona forn'jen sur la tola sakomaljuna «Mons» en dorm'.

Vesperigo

Mola neĝ'el l' aer'dum grizaj ĉi vesperoj. Pac', silent', svaga vent'. Kuŝas korto kaj tegment' sub lanug-neĝeroj.

El fojne'j Veslemey portas la furaĝon. Gnoma ul'en l' angul'ĝojas pro la fojna bul': Al brutar' nutraĵon.

Praa libienon ĉien zorgemo gardas, en deĵor'dum ĉiu hor'de strebado kaj labor'; prefere brutojn vartas.

Ĝojas lipri la sci', ke ion donos Injo. Griza ul', ruĝ-ĉapul' vespere lakton en l' angul'ricevos de l' knabinjo.

Manĝigas ŝibovinojn ĉi, kaj ĉiun ŝi karesas; varma kor', bonhumor' regas dum ĉi ŝatlabor'. Ŝi gnomon ne forgesas.

La trinkaĵ', farunaĵ', el fajrej' portiĝas. En febla bril'de lumigil', jen ŝi melkas en trankvil'; sitelo plenpleniĝas.

En kontent', sen manko-sent' bovinoj remaĉadas. Trankvilas dom', vigilas gnom'; alportas tufon li por krom', kaj kun la kat' dancadas.

Ĉe la fajrejo

En ĉiuj ejoj labor' finiĝis. Ankoraŭ ili ne eklumigis. Servisto Lars daŭras en la stal'. Patrin' dormetas sub sia ŝal'.

Kaj Per kaj Manjo, la du najbaroj, nun enen tretas post endaj farojen amikejon sen ĝen' aŭ hont'; aŭskultos ili al rakont'.

Pri distro ili ja nun esperas; kaj rakontadi Injet' preferas. Pri fabloj temas kaj pri fabel', pri trol' kaj besto en vila fel'.

«La Holand-knabo, li vaste ĉasis, kaj iam urbon kun pred' trapasis, sed ne atingis vilaĝon ĉi; survoje hejmen sorĉiĝis li.

Aspektis montoj translokiĝintaj, kaj vojdirektoj sin turnigintaj. Ter' estis akvo, kaj akvo ter'. Mar' estis mont'. Sudo norda sfer'.

La hejma ej' estis en forgeso;ĉirkaŭtiriĝis li nur sen ĉeso.Rapidis reen li kiel flam'pro tempo-pas'; vesperiĝis jam.

Sentiĝis kvazaŭ suĉanta tiro;al Vatn li venis sen mema iro.Vi kredu: kaptis lin jen la tim'.Denove devis li turni sin.

De nura koto la voj' kovriĝis;la nokto plie kaj pli nigriĝis;kaj malaperis la voja rand';li estis kvazaŭ en fremda land'.

Post longa vojo en pen' irita,rokeje staras li konfuzita.Li ne ĉi-estis en sia viv';sed domon vidas li en dekliv'.

En embaras' lin plenigis ĝojo.Eniras li por demand' pri vojo;ŝtopiĝas spir', ĉar pri tia dom'neniam aŭdis iu ajna hom'.

Briladas jen kvazaŭ mil lumetojsur tabloj, benkoj kaj sur benketoj;kun perloj glimas knabin-harar',je tret' tintadas arĝenta ar'.

Intencon sian li tuj forgesas,ĉar bonvenigoj neniel ĉesas;prizorgas ili laŭ vic' en rond',ĝentilas kvazaŭ al princ' de l' mond'.

Li tuj forgesas la hejm-bienon.Sidiĝas li sur la silk-kusenon.Konfuz-gapanta al ornamar'li ne respondas al servistar'.

Se li soifas, trinkigas ino;ŝi brile belas, la domfilino.Neniam tiel aspektis in';miraĝo kvazaŭ envolvas ŝin.

Li rigardadas ŝin ĝis sveniĝo;ridet' lin portas al ekardiĝo.Kapsigne diras oldul' al li:"Se ŝin vi ŝatas, ŝin havu vi."

"Se ŝin ricevus mi kaj bienon,ne plu suferus mi streĉan penon.""Post mia morto al vi la ter',kaj nupton festos vi ĉi-vesper'!"

Glatiĝas ĉio nun por vizitoal ŝia preta, pornupta lito.Klariĝas tiam la ver' pri ŝi.La huldran voston ekvidas li.

Timiĝas li, kaj li eĉ ekridas,kaj tuj tranĉilon li elingigas;sed sammomente aŭdiĝas kri',kaj malaperas bien' kaj ŝi.

Ĉe Holand-monto li konsciiĝis,kun kapdolor' en malsek' fridiĝis.Li jen komprenis: En pasinta tag'forĝesis "Patro-nian" tiu knab'.

Sed poste ofte, dum li vagadis,la saman huldran li renkontadis;kaj tiu plore priplendis sin:"Povintus savi vi ambaŭ nin."

En montaj ejoj ja certe multasĝemadoj, sed ni ja ne aŭskultas; sopiras tie al tag' kaj sun'gemizeruloj en gnom-komun'.»

La pasero

Pasero en la kortomanĝetas grenon ĝis plensat', kaj ĝojas pro la sorto, kaj ridas al la kat': Pip — pip, dum tagoj pasas
Mons min ĉasas, sed min libera lasas
laŭ mia propra ŝat'!

Min la flugiloj levas, nur leki povas sin la kat'. Kvit, kvit, suferi devasli pro la memkompat'. Se akcipitro provas, ĉu li povasmin kapti, tuj mi movasmin for el tiu ŝvat'.

Pro viv' facila povasmi nur kontenti, jes en ver'. Sufiĉan manĝon trovasmi ĉiam laŭ prefer'. Mi timi ne bezonas, ujon konas; al mi sufiĉon donas
rikolto de somer'.

Kristnaske ofte donasfrandaĵon Veslemey al mi. Fojnejon mi disponas, kaj varma estas ĝi. Printempe mi libereenaereflugas, kaj fierekonstruas neston mi.

(Tradukis H.A. Rosbach)

Kantiĝas

Malsekeca nebul-humid'. Luna brilo tra nokta frid'.

Nuboj en laktokolora lum'ondas ombre sub pala lun'.

Densas, disas la ombro-ar'. Zume kantas la paca mar'.

Sorĉe regata sonĝas la viv'. Peza dormo sur kamp' kaj dekliv'!

*

Kuŝas Injeto sur benk' ĉe l' forn'. Milde lunbril' ŝin vekas el dorm'.

Trance inerta vekiĝas ŝi nun. Ombroj vidiĝas en glimo de lun'.

Kapro trotras saltante laŭ mur'. Vento spiras kun ve-susur'.

Lule kreskas loganta kant'. Vibre insistas amopetant'.

*

Se scias vi sonĝon kaj kanton ĉi, la tonojn vi garde karesos, multfoje loge mi ludos por vi, neniam vi tion forgesos. Ravege por vi. Vi loĝu kun mi. Ŝpinilon arĝentan ricevos vi.

La freŝa nokt' ne timigu vin, radikoj entere ĝermantaj; kastelo en sonĝo, vi vidis ĝinkaj ludojn de inoj dancantaj. Fruktigas dormet', verdiĝas bosket'; feliĉos vi pli ol dum tag', Injet'.

Pro dolĉa nokto ne estu tim'. Streĉiĝas la sonĝaj flugiloj. Pli mildas ol tago la luma glim'. Pli softas la son' de ludiloj. Jen lulo en val', dormiĝ' post batal', feliĉa vi estas je taga fal'.

Pro nokto profunda ne estu tim' dormante sub ŝveba vaporo, vidante teruron trans griza ŝim' al sonĝaj mondoj en foro. Kaj lulas ĝi vin, luliĝas l' anim' el tago kaj sun' blindigintaj vin.

Pro amo sovaĝa ne estu tim', ĝi pekas en plor' kaj forgeso; mildiĝas al vi la ardanta sin'; la urson li jugas al dreso. Ravege por vi. Vi loĝu kun mi. Ŝpinilon arĝentan ricevos vi.

Antaŭsciigo

Injeto kuŝas dormeen griza frua hor', kaj vidas sian franjonstaranta en l' aŭror'. La blanka vualo moleondas ĉe tors' kaj kol'; lumeta glimo trembrilas pro movoj en ŝia tol'.

Pokalon el pura arĝentoŝi portas per magra man'. La grandaj pacaj okulojrigardas Injeton en am'. «Vi povra, juna fratino!» ŝi diras en zorga tim', «jen profunda kaliko. Vi malplenigu ĝin.

Vi havos plej pezan sortonportendan de homa id'. Kion la nokto kaŝas, rivelu via vid'. Tial kuŝas perfidajkaptiloj ĉe via pied', sorĉontaj vian menson, logontaj vin sia pred'.

Vi iros sombran vojon. Atentu, atentu, fratin'! Sed kiam vi elglitos, apude vi trovos min. Atentu, atentu, fratino! Glita, tenebra la voj'. Sed post la peza noktoekbrilos mateno en ĝoj'.»

Feliĉa vekiĝis Injeto, etendis sin al fratin'. Ekbrilis tra la vitrol' unua matena glim'. La kara beata fratino forglitis en lum-silent'. Suspiro forbloviĝis en frumatena vent'.

Dimanĉ-trankvilo

Frosto krakasen muro-fend'.Sun' briletas,ekdormas jen,kaj ruĝon sur neĝon ŝutas.

Pendas nebul'kvazaŭ frosta pont'super glaciej',sur ĉiu mont';sed la korto en vintra klar' mutas.

Per okulvitromaljuna patrin'legas en libroĉe l' tablofin'pensante pri fina vojaĝo.

Ĉe ruĝa fornogejunular'pomtranĉojn fritas dum maĉa knar';jen ege bongusta manĝaĵo.

*

«Kio flusiblas ne silentante en la sovaĝejoj?»«La roĝo flusiblas ne silentante laŭ la longa fluejo.»

«Kio hakante la tutan tagoneĉo ne spliton faligas?»«Horloĝo tiktakas la tutan tagoneĉo dum vesperiĝas.»

«Ĉambro plena de griza lan'de neniuj kapteblaj?»«La fumo estas tiu lan'de neniuj preneblaj.»

«Sentiĝas sur mola kato-nazovarman kaj ankaŭ frida.Ne estas interne kaj ne ekstere,tamen tegmentita?»

«Ne interne kaj ne ekstere,varman kaj ankaŭ frida,estas la klara fenestrovitroĉie tegmentita.»

«Ove ronda kaj ege longakiel preĝeja vojo?»«Bulo de fadenaro ronda estas kaj longa kiel vojo.»

«Pendas kvar, kaj iras kvarkiam somere floradas.Spektas urben du, montras du al nubo'kaj unu poste trotadas?»

«Bovino kun mamoj iras sur kvarkiam somere floradas;montras kornojn al nubo', okuloj al urbo',sed vosto poste svingadas.»

«El bruna fundo ĝi ridas al vi,sed supre ĝi blankiĝas.Sub lin-kovril' ĝi ludas en kuv',sed korpon ĝi vigligas?»

«Fermentas biero, bruniĝas ĝi;supte ŝaŭmo blankiĝas.Sub lin-kovril' ĝi ludas en kuv',kaj korpon ĝi vigligas.»

«Dumvintre kreskas stranga arbo';printempe ĝi malkreskas;radikon supren, la supron sub,kaj ĝi maldika estas?»

«Glacia pendaĵ' estas tiu arb', printempe ĝi malkreskas; supron malsupre
pendas ĝi, kaj ĝi maldika estas.»

«Kion neniam vidos Di', sed ĉiutage ni vidas?» «Egalan ulon ne vidos li, sed
ĉiutage ni vidas.»

«Senradika kun longaj radikoj, matene sur kvar ĝi rampas; tagmeze iras ĝi
tamen sur du; vespere sur tri ĝi marŝas?»

«La hom' senradika kun longaj radikojek de Adamo devenas. Unue ĝi rampas,
iras poste sur du, sed fine bastone promenas.»

INJETO VIZIANTA

Panjo atendas

Ĉe arde varma fornosub vakskandela bril' per magra brako de l' patrin' turniĝas
radŝpinil'.

Malgrasan korpon kovras robo el kruda lanaĵ'. Klinas sin kap' sub nigra volv', —
balanca «bul' de teksaĵ'».

Ŝi tiras longan fadenon per sulkiĝinta man'. Kanton sian grumblas ŝpinil' de sub
la tufo de lan'.

Laŭ planko kaj oldaj muroj, aspekte draka ŝajn', faŭkas la sombra ombro-
nokt' glutante ĉion ajn.

Ĝi cedas sed reaperasel densa mallumej', dorme, time oscedas la
nokt', gapanta el sonĝa ej'.

Kvazaŭ spirit' el tombokrepuske levas sintien kaj reen vibrantela ombro de l'
patrin'.

Ŝpinila ombro ŝvebasturnante sur griza mur'; la «bul' de teksaĵo»
balancadas ŝpinante en obskur'.

Kandelo brulas malvigle, kandelo brulas en blu'; plenigas panjon pezaj
pensoj: Okazas io, ĉu?

Ploradas ĉe l' mur-anguloj, krakas en fend' kaj tru'; timemo frapas
bruste: Okazas io, ĉu?

*

Ekhaltas la ŝpinil', stuporas korp' en tim'. Kurpaŝojn aŭdas ŝikvazaŭ por viv' kaj anim'.

Aŭdiĝas peza spir', suspiro kaj ĝemad' en preĝo al Sinjor', kaj kvazaŭ korfrapad'.

Ekstaras jen patrin'. En timo paŝas ŝi, kruc-signas sin dum preĝo: «Jesu', ŝafid' de Di'» ...

Lantas la horloĝ', nun eĉ lantadas ĝi, mortas ĝi kaj haltas ... — «Paciĝu, nokton ĉi!»

Mallumas ekster dom', malbelas ekster mur'; ekstere vent' ululas: — «Ho, estu pac', sekur'!

Kaj meze sur vastej' kuregas povrulin' kun frida dors' pro timo; ho, hejmen sendu ŝin!

Mi aŭdas nenion plu ... Elkore preĝas mi: Injeton pace sendual panjo tien ĉi!»

*

Aŭdiĝas jen denovela sama paŝ' en tim', la sama anhelad', la sama kur' por viv'.

Flug-malfermiĝas pord'; ensaltas pala Injet', buŝon seka, faŭka, el okul' delira ĵet' ...

«Ho, Panjo! — Timas mi, fariĝis ega hid'; kaj aŭdu: — en Fendejo aperis stranga vid'.»

«Ĉi tien, infanet', ne venos draŭgo ĉi. Eksidu; ĉu vi timis? Vin kuri aŭdis mi.

Jen, por vi laktogut'; nun trankviligu vin. — Ekskuis min antaŭfantomo; mi klare aŭdis ĝin.»

Injeto

La minca kaj svelta knabin' en bruna, serena malhel'; vizias en sia anim' al iu fora cel'. Ŝajne pro iu pov' dormiĝis ŝia mens'. En siaj parol' kaj mov' subardas prema pens'.

Sub bela, malalta frunt';brilas l' okul' tra humid';Aspekte al fora mond'direktas sin ŝia vid'.

Ŝi iras al benk' ĉe l' fajrej',eksidas sen plia atent'.Jen lakton ofertas patrin',kaj trinkas Injet' en silent'.La brusto ondas sub prem',kaj paliĝas la buŝ' en vibrad'.Ŝi malfortas, feblas en trem'meze en sia juna florad'.

La vidaĵo

«Ho ne, patrino. KREDU VI,ke ne pri sonĝ' rakontas mi.Reviglas pens' kaj forto.l' unuan fojon, sen atend',rigardis mi tra streta fend'en mondon de la sorto.»— «Avertis vin la morto!»

«Ne plendu pro Injet', patrin'!Ne serĉas nun la morto min,ne estos mi viktimo.Sed panjan fraton perdis ni.Mi vidis lin, kaj brilis lien fosforeska glimo.»— «Kompaton al animo!»

«Mallumo regas sur l' altej';ombriĝas voj' al hejma ej';en pens' pri Di' mi paŝas.Silentas kiel en la tomb',endormiĝinta ŝajnas mond'.Orele sango frapas ...»— «Misterojn nokto kaŝas.»

«Ne timis mi, sed nur je mir' ...ekŝvebis el mallumo vir'en lun-lintuk' laŭ tero.Rekone lin atendis mi.“Adiaŭ,” milde flustris li,forglitis en l' aero.»«Lin prenu Di' en ĉielo!»

«Aŭdiĝis en l' altejo kri'.En tim' prudenton perdis mi.Kadavra laodoro!Frenezis mi en stumbla kur'ĝis hejme ĉe vi en sekur'.Sed grac' je la memoro.»— «Pacigu lin Sinjoro!»

La Montarino

Sciiĝis tagonfrostiga dir',ke ĝuste tiamforpasis la vir',ekzakte en sama horo.

Jen tremis Injoen mens' kaj korp':«Mi devos do vidifantomojn en hord'kaj draŭgon longhararan.»

«Vin, kara Injo,kompatu Di';pli bone estuske mortus vi;vi trovus pacon en tero!»

«Sed klare vidipreferas mial iri blindatra mondo ĉisen eblo veron distingi!»

— Poste vidiĝisubtera popol',koboldo kaj niksokaj ogro kaj trol'kaj draŭgo longharara.

Ŝi foje murmurisaspekte sen senc’;timiĝis eĉ proprapatrino en mens’.Diriĝis:
Mankas prudento.

En erikej’inter montoj trila tutan vivonpaŝtadis ŝi.La Montarin’ ŝi nomiĝis.

JULO

Junuloj

La duan tagon en temp’ de Jul’ariĝas por danc’ ĉiu in’ kaj ul’;ĉe panjo ili
kunvenas.Kota kaj ŝlima estas la voĵ’;ĝi kuŝas sub neĝa pluv’ kiel roĵ’,sed
tamen ĉiuj alvenas.

Ni scias ja kiel la juna kor’post zorga penado en taga labor’sopire al danco
tentiĝas.Intensa la gajo kaj kara la ĝoj’,kaj salt’ ĉevalida fariĝas, oh hoj!piedoj
planken frapiĝas.

Kaj trinkas la knab’ por ioma kuraĝ’;li kante antaŭas kun brila vizaĝ’la varmajn
manojn tenante.Ho hej! svingiĝas la brak’ en feliĉ’,kaj poste saltglitas knabin’
en la vic’,per blankaj dentoj ridante.

Kaj ŝvelas ĝoja la juna kor’;foriĝas zorgo kaj pen’ kaj plor’;la vivo soras kaj
soros.Ludas l’ animo, ridas l’ okul’,ardas la amo en kor’ de l’ junul’;li jenon
ĉiame memoros.

Sed kiam abundas troa drinkad’,vekiĝas emo al bru’ kaj batad’.Envenas la
Malbonulo.Li sidas angule, ridanta la gap’;finiĝas damaĝo per murda frap’je
ĝojo de l’ Diablulo.

Misiras ofte knab’ al mizer’;knabino spertas pri hont’ kaj sufer’;la ĝojofariĝas
fiaĵo.Bonmaniere gajiĝu ni,kaj laŭdon donu al nia Di’,donanto de vivo kaj
graco.

Festeno

Ho — hej! Ludil’! Nun ekludas ĝi,por danca svarm’,kun rid’ en larm’,ho venu,
venu knabin’ al mi,ni ludu en ama duo.Kaj longe pudoro fremdigis ninen longa
dezir’,en sonĝa sopir’;nun havas vi min kaj mi havas vin.Hoj, kia grandega
ĝuo.

Memoru fojon sur verda herbej', jen mi kun falĉil', jen vi kun rastil', kaj nian
riponon sur muska ej', ho, kiaj tagoj de amo! Rigardis mi vin, kaj rigardis vi
min, ni ridis en em' kaj senvorta kompren'; jen pensis mi: mi havos vin, por posta
kunviv' en ĉiamo.

Ho mia, vi knabin', ho atendar' sen fin'! En mia mens' min hantas pens': ke
estus ni nun survoje! Solecas mi en ted'al frida vivo pred', sed kredas mi: se
kunas ni, ne zorgus mi tiomfoje.

Hoj hej! ni dancadu ĝis danca fin'! Turniĝas la sun', turniĝas la Jul'; eksaltas la
vir', postsaltas virin'! Okazas nun ĝustmaniere. Printempon fariĝos alia
danc'! Hoj hej kia far'! Hoj hej kia par'! Ni ludos kune en kroma ŝanc' en ĝojo
senhalte, sincere.

Kun salt' kaj ĵet' ĝis al plafon' en danc-impet' laŭ violon' la forta knab' per firma
kapt' knabinon nun svingadas.

Jen alsturmad' kun salt' kaj sku' en kontuzad' kun ega bru'; flatanta knab' pro
ŝajn-tentad'al dolĉa kuŝ' logadas.

Singarda in' per ridmokeg' rifuzas ĝinen mokrideg'; bier' en flu' kaj sang' en
brul'; ludilo lud-kantadas.

*

Eksidis Injet' en malluma angul', rigardas ŝi murmuradanta; sekreton ŝi vidas
pri ĉiu opul' sovaĝa, dancanta, saltanta. Svarmadas ombrar', multnombra
bestar', fluganta, rulanta mistera ar'.

Dum danco al ĉiu petola hom' postsekvas nun ombro fidela, kaj blanka aŭ nigra
ĉiu fantom', aŭ hida aŭ eĉ pli malbela. Se eblus la vid' jen velkus la rid', kaj
turnus sin ili de l' fia hid'.

Jen Topp-Ola Lejte, frizita ĝis mok', en svinga kondu't' kiel moŝto. Lin sekvas
tro-sinestima kok' kun longaj spronoj kaj vosto. Kun Petro en fid' kuniras
ŝafid'. Al Jo sekvas vulpo, ruzul' en perfid'.

Kun pigra Knut Os, tiu senzorgist', la porko ja estas kompano. Al Andrias
Holand, knabino-ĉasist', postsaltas virŝaf' ĉe l' kalkano. Pro parol' en velur' kaj
aspekto de pur' post Svein kuras lup' kun longa krur'.

Malzorgan Jens sekvas magra ĉeval';ĝi vidis nek fojnon nek akvon;kaj urs'
akompanas al forta Lars Val',Jakobo, li havas nur katon.Kristjano
Fendul'ŝajnigas sin bravul',sed saltas laŭspure la leporul'.

Kun Dik-Mali stumblas grasa porkid';Babil-Guri havas kaprinonĉiam helpema
al ŝiro kaj pik'.Ĉe-kuŝ-Berit havas hundinon.Al Mari sur Dig'postsekvas la
pig',al altkoksa Rakel la ĉevalid'.

Al Maren kaj Mette kaj Lizabet'kaj Stine de l' Mont-Dorsa-Finokaj Jorina Klopp
kaj al Olina Klettpostsekvas po unu kokino.La inaĉo de Oskun arĝento sub
ŝlos',ŝin sekvas anser' kun memfida bros'.

Jen dancas vigle la gaja mond',kaj vibras traboj kaj fostoj,du- kaj kvarpieduloj
en rond';svingiĝas brakoj kaj vostoJ.Jen nova brudad',alsturma kurad',ensaltas
amaso en miriad'!

Monta fein',draŭgo, niks', gnomin',hirtharara trol',svarm' en skua fol',nano en
kur'per leĝera krur'ĉiuloken nun rampadas;mezen en nanar'sin ŝovas
dancantar';dancon en angul',ne vidas hom-okul';kaldrono kaj fritil',korn' kaj
gnom-ludil'strangan kanton sonigadas:

Akvoguta kluk', roja murmurad',uestventa plor', muĝo de ondad',vortoj en
angul', sono de flustrad',fal' folia susuradas ...

Dancu nun, viglu nun,gegrizuloj.Viglu nun, dancu nun,dormas sun'.Lamu nun,
saltu nun,gegrizuloj.Saltu nun, lamu nun,hoj! jen
Jul'.Bummel,bammelrokadanc' kaj rammel,montodors'
bluiĝis.Bammel,bummel,rangedanc' kaj rummel,sun' kaj lun' mortiĝis.

*

Sovaĝe, hej! en anim' kaj sin'.Hej! turnu vi vin,Hej! svingu vi vin.Eksaltas la
vir', postsaltas virin',spitante la limon de deco.Vidiĝis ne tia ĉi hurlumhej'kun
svarmo kaj klak',kun muĝo kaj krak';portiĝas ulul' al fora ej';ebrio kaj frivoleco.

Tingeltangelrumladanc' kaj rangel,krak' en ursa robo ...

Kaj jen la knabo, ho hej kaj hi!tra montara brum',kaj tra fajra fum';se volas vi
havi min, povos vi;per nur fingra indik' mi ricevos.Ho! donu la buŝon, ho-ho,
ho-hej!Laŭ eta invit'vi havos en lit'plej taŭgan ulon el ajna ej'!Vi vidu ke dance
li ŝvebos.

Tangeltingelvibrodanc' kaj vingel;bone en ombro dum Julio

*

Sidas Injeto en sorĉa tord'kaj peze el brusto spiras. Nun suben kaj norden
drivas la hord', ĉar troloj kaj homoj miksiras. Velkas la lumoj, kaj obskur' ĉirkaŭe
daŭre densiĝas. Pli da troloj ensturmas en kur' — kaj saltodanc' ekludiĝas:

Hoj, hoj, kara vi! Vin amas ja mi! Vi ludu kun mien sudeli-dudelidej.

Hoj, hoj, bela vi! Atendu min vi! Mi venas al vien dudelidej.

Loganta in', vi! Mi turnas min al vikaj loĝos kun vien Haŭkeli-Haŭkeli-ej'.

Ravega in', vi! Ekloĝu kun mi! Ŝpinilon turnu vien Haŭkeli-ej'.

Ŝpinu vi harojn, tordu fadenojn, triku vi ŝtrumpojn, surelilej.

Al vi mi kantu, por vi mastrumuame karesu, hudelideja!

Tekson ni varpu, trabon ni turnu. Pinon ni brulu! surelilej; lulilo, ĝi knaru, panon ni
faru, ni ne avaruelibeja!

Mirloga ja vi! amadu kun mi, kaj dancu kun mien sudeli-dudeli-dej; belega in'
vi, atendu min vi, mi venas al vien dudeli-dej ...

*

... Dolĉe kiel plor' sonas harp-sonor'; logas ama sent' kvazaŭ milda vent'; flata la
lul', kiel onda rul' dormiĝas ĝi en sonĝ-trankvilo; vekiĝas el silent', ŝvelas en
potenc', kiel ŝaŭm-susur' en la mar-murmur'; el la dorma ĉarm' ŝvebas tona
svarm' amovarma, dolĉa trilo ...

Jen dancas la gnomo en bela kolor' kun ringo sur haroj ondantaj. Li logas
Injeton per danca fervor' dum tonoj ĉirkaŭe vibrantaj. Ravege por vi! Vi loĝu kun
mi! Ŝpinilon arĝentan ricevos vi.

Ursego bruna mi estas dum tag' en vastaj arbaroj kuranta, lavanta hararon
profunde en lag' kaj fortajn torentojn vadanta. Mi ludas sur strand' kaj regas sur
land' ĝis fora montar' ĉe la vidorand'.

Sed kiam proksimas la meznokta hor', kaj montoj englutis la tagon, la am-
melodion vi aŭdas el for', plej mildan, sorĉantan logadon. Venigas vi min, kaj
serĉas mi vinpor dormo sur brak' de mia amikin'.

Vi sidu en silko kaj brila arĝent'en Blua-Mont' fianĉino. Neniam plu venos tag' de lament', peliĝos ĉagreno el sino. Ravege por vi! Vi loĝu kun mi! Ŝpinilon arĝentan ricevos vi.

Li manon palbluan etendas al ŝi. Ŝi tremas pro tim' je la tuŝo. Sed kiam ŝi donus kison al li, sin montras la rata buŝo. «Jesuo!» — Injet'en sven' sur benket'kun nom' de l' savanto en sava pet'.

EN LA PAŜTEJO

La vento-troloj

Tŝjuh! Buh! diras nord-ventulo, ululas trans nudaj altejoj; blankbarbe li flagras per nigra flugil', blankiĝas sur mont' kaj herbejoj. — Tŝju ...

Tŝjuh-hu-hu! diras trol' nord-uesta. Turniĝas kiloj, jaĥtoj. Kirliĝas la maro el profund', skuiĝas ĝis dek kvin klaftoj. — Tŝju ...

Tŝjui-lu! diras uesta maruloen sia elmara furi'. Dance li ludas sur brunaj deklivoj; fidinda ne estas li. — Tŝju ...

Tŝjui-lu! diras uesta maruloen sale malseka furor'. Li logas per sun' kaj bluo milda. Finiĝas ofte per plor'! — Tŝju ...

Tŝjui-su! diras ul' orienta, li akras en sia hel'. Li venas de brilaj montopintoj, kalvaj kun blanka ĉapel'. — Tŝju ...

Sulilu! diras suda lum-elf' susure en foliar', kaj lude li kantas kaj milde fajfaskun haroj el bunta florar'. — Tŝju ...

Sulilu! diras suda lum-elf'; paŝtado tiam bonas. Kalme estas ĉe ŝton' sub sun'; ŝafidoj miaj petolas. — Tŝju ...

Sulilu! Beata somerokun sun' sur ej' kaj labor'. Jen ĝuas mi dormon en erikej'; vekiĝas el ĝi sen plor'. — Tŝju ...

Ne estas facile

Ho povra, nun vi frostas, ĝentila mia ŝaf' sub pluvo el la uesto, skualaj ĵet' kaj paf'! La ŝton' feina ŝirmas vin kontraŭ humidec'. Kurbiĝu kaj ĉekuŝu, tieas la eblec' por mildec'.

Bovino volas hejmen; streĉiga estas pel';trankvilo ne troviĝas sub daŭra pluv' de l' ĉiel'.Sed en fojnejo nia nun regas nur malplen'.Ni haltu en l' altejo; ni trovos ion jen,sen troa pen'.

Ne estas tiel aĉe en ŝirm' ĉe l' roka mur';pasigu ni la tempon en iom da sekur'!Kaj eble tie hultro enlasos nin al si;ŝi scias, ke hodiaŭ dum paŝt' suferas ni,vi kaj mi.

Laŭ dorso komenciĝis malvarma akva flu'.Mi tretis en la marĉon, kaj truon havas ŝu'.Malseka peze estas vestaĵo ĉe la sin'.Nun haltu kaj atendu, ho kara vi, bovin',sekvu min!

Malvarmas; baldaŭ frosto en brusto pikos min.Rapidos mi al varmo en domo de patrin'.Mi povos ripozeti post ŝanĝo de vestaĵ';farunon vi ricevos. Estos varma la trinkaĵ',ho ŝataĵ'!

Birdoj

Kra! Kra! grakas korniko,sub nuboj en pezaflug',Humila vestiĝas ŝi per kamlot'sen brila butikotuk'.

Ŝi iras sur kampo en aroĵ.Pri gajno ne mankas sci'.Ŝi ŝajnas digna bienmastrino;ŝin tamen ne fidu vi.

Ŝi havas leĝan okuponĉe muro, barilo kaj pont',sed kiam atente ni pririgardas,ŝi ŝtelis ovojn sen hont'.

«Skar-rar!» diras pigo,ŝi saltas kokete laŭ ŝajn'.Skaras kaj vigle baskuladas,kaj taŭgas neniel ajn.

Ŝi estas vagulino,disvastigant' de kverel';ŝi ĝojas je klaĉo, mensogo kaj mok';ne estas ŝi fremda pri ŝtel'.

«Kvirli-kvit!» diras sturno,verd-nigra en brilo de sun'.Ĝoje ŝi saltas perle belakiel infano en jun'.

«Tip-tip!» kuradante dirasgracia motacil'.Ŝi estas kiel infana penso,pura en sia babil'.

«Smek-smek!» saksikolo pepasseke sur sia ŝtonar'.Sed eta, bruna birdo-reĝosin kaŝas inter florar'.

«Tirli-ti!» alaŭdo flugasĉielen sur ĝojo-ond'.Kaj kiam ŝi tirlas en frumatenon,fariĝas nova la mond'.

«Tirli-ti!» alaŭdo leviĝasal volba ĉiel' en aŭror'.Kiam ŝi tirlas en fru-
matenotikliĝas en mia kor'.

«Vi-vip!» la vanelo fierasper sia kapa gest',en plum-ĉapelo, velura jakokaj
blanka silka veŝt'.

Ovojn belajn mi trovis en nesto.Sekve rabiĝis ĝi.Birda patrino dolore pepis;—
neniam plu faros mi.

Pluvio, la bela, bruna birdo,velurvestita trezor',kiam ŝi fajfas en
erikejo,varmiĝas en mia kor'.

Pluvio, la bela, bruna birdo,kun paŝoj malpezaj sur grund', —kiam ŝi fajfas en
erikejo,mi ploras en kora fund'.

Je somermezo

Suda pluv'! Somera pluv'!gutas milde el nubeto;ardan aeron ĝi
freŝigas,sunbrulita kamp' rosiĝas.Gutas kaj gutadas longe;ter', printemp'
laviĝas sanaj;ĉesas post labor' kontentamilde, dolĉe pluv'
vespere.Malfermiĝas ekspiranteflor', foli', vivantoj ĉiuj,tigo, ŝalm', eriko freŝa,la
mirik' kaj junipero.Feliĉego elspiriĝasen la miloj da odoroj,miloj da odoroj
dolĉaj, —ĝis l' aer' balzame fluas.Volvas teron en flaraĵonama svarmo de la
vivo,kiel la vual' sur brunajrondaj, logaj inaj mamoj.

Injo kun brutar' trankvilainter la montetoj paŝtasnorde ĉe la nigra
lago,kunkreskanta marĉ' per musko.Marĉ' profunda, danĝeregasub la musk'
kaj marĉa lano.Funde de la stagna lagodormas la erikserpento.En dekliv'
brutar' paŝtiĝasbuŝkaptante eriketojn;vigle la ŝafidoj dancasal patrin' por
suĉon serĉi.Kiam sin somer-vesperovolvas mole super tero,kaj la hela fum'
vesperavid-miraĝe levas ĉion —jen trikaĵon ŝi forgesaspro impreso de la
sensojkaj en senpripensaj pensojglitas for, vizie revas:Vidas ke herbej'
viviĝas,ke vekiĝas ĉe ŝtonarokaj rekreskas la herbarokie jen brutar'
paŝtiĝis.Montulin' en blua jupo,sur la brust' arĝent-folioj,sidas sub dekliv' sur
tufo,ŝutas salon al bovinoj.Ŝi ekstaras kaj logvokas,ŝultre ondas la hararo;sin
la grego vic-arigaskaj montaren vice paŝas.Brut' post brut' en bona ordo,laste
Dimeld, granda bovo,kvazaŭ ombra ar' en movosiluetas en la nordo.

Estingiĝis lum' surtera,grize velkas nuba ondo,aŭskultante kuŝas
mondo;sonas kvazaŭ kant' vespera.

Longe restis vi kaj mien la hejm-paŝtejo; por somero iros nial la Skar-montejo. Venu, vi bovin', kun mi! Skar-deklivo freŝas pli.

Brutaro! Brutaro! Sur mont' estas verda herbaro! Bovinoj! Bovidoj! Hoj! Dimeld kaj Dros, Hoj! Randeliros, je vesper'!

Bone estas ĉe Norda-mont' en bosko subterula. Longa la trankvila nokt'! Kurta tag' sunbrula! Freŝo, paco en montar', ŝirmo kontraŭ malbonfar'.

Kiam ŝveba nebulej' malheligas teron, ni vagante laŭ altej' ĝuas la liberon. Dum nebulo sur dekliv' — sendanĝera huldra viv'.

Trol' min ofte en vesper' ame alparolas; promesiĝas mont' kaj ter' se mi lin nur volas. Tute ne allogas min vivo kiel trol-edzin'.

Huldro en aflikta plag' ame bruli devas por la hela knab' de l' tag', kiun ŝi prirevas. Huldran econ ŝanĝus mi, kontraŭ estontec' kun li.

Sunleviĝ' kaj sunsubir', vintroj venas, pasas; sen amik' kun amdezir' huldro sola vagas. Longe daŭros ema brul'; venos ne la hela ul'.

Brutaro! Brutaro! Sur mont' estas verda herbaro! Bovinoj! Bovidoj! Paŝtejen sopir', altejen la ir' je vesper'!

La herbsezono

Falĉiĝas laŭvice la bunta florar', ĉar kantas falĉiloj en suka herbar' la herbojn elradikantaj. Facilas falĉad' en rosmola herbej'. Laŭvice svingadas sin en la falĉej' la knaboj kvazaŭ dancantaj.

Jes, svingu kaj razu herbejon, falĉist'. Odore disfalas la herb' sen rezist'. Aroma mondo de floroj! Inundas deklivon, vilaĝon l' odor', kaj sento de sekureco en kor'dum mezsomertagaj horoj.

Alternu nun suno kaj vent' sur herbej', ke l' dia rikolto en nia fojnejoj sekure, benite stokiĝu. Ke estu sufiĉa sekeco sub sun', ke putre ne velku la fojn' dum aŭtun', kaj Julio ĝojiga fariĝu.

Injeto miras

Knabinoj rastas, falĉas knabar'; ŝerckrioj flugas en gejunular'. — Jen kiam la sorto regas —.

Vigle estas sur la herbejojen la herbaro laŭ la falĉejoj.— Jen kiam la sorto regas —.

Ekridi kaj ŝerci — nun bone pri ĝi;kelkfoje tion ja faras eĉ mi.— Jen kiam la sorto regas —.

Imagu ke knabon afablan mi vidus,kiu pri mi, Montarino, ne ridus!— Jen kiam la sorto regas —.

Jes, ŝerce petoli faradu knabin',sed tamen ĉu edzinigu ŝi sin?— Jen kiam la sorto regas —.

Se belas knab' kiel infanul',li iĝos malĝentila junul'.— Jen kiam la sorto regas —.

Se juna ulo afabla estas,li iĝos trol' kiam li plenkreskas.— Jen kiam la sorto regas —.

Imagu logi al svata iro.Imagu rajdi al nupt' kun viro.— Jen kiam la sorto regas —.

Atendas nura mizer' edzinon,sed vivo sen viro ne logas knabinon.— Jen kiam la sorto regas —.

Amuz' por knabino, sed pen' por edzin'.Prudento mankas al juna in'.— Jen kiam la sorto regas —.

Prefere al ŝanĝi virginan statonakceptos mi paŝtistinan faton.— Jen kiam la sorto regas ...

Prefere al dura edzina pen'mi iros almozi en ĉies bien'.— Jen kiam la sorto regas ...

Prefere al zorgoj pri idoj kaj vir'mi povrulinos en land' kaj foir'.— Jen kiam la sorto regas ...

Ridi kaj ŝerci supraĵe, — jen mi;sed kisi barbulon? Ho, fore de ĝi!— — Sed tamen, — se l' sorto regus?

Kondamnita

Aŭtuna vesper' super plata land'.Ekkraĵo mara ĉe l' norda strand'.

Ueste blu-fridaj nuboj en ŝveb'.L' okulo de l' tag' estingiĝas en krev'.

La marĉoj dormas en bruma vesper'.Averte susuras fluanta river'.

Nebule insidas sorĉa fort'; —rapidas Injeto al hejma kort'.

*

Sed vidas ŝi sur la kamp' ĉe l' river'strangan oldulon, kurbita al ter'.

Vestoj de jam pasinta jarcent' ŝirmas lin kontraŭ la ŝira vent'.

Frapas ŝin akra anima ŝok'. Ne povas ŝi movi sin el la lok'.

Ŝancele iras la vir' laŭ la bord'malantaŭ partiga barila pord'.

Stumble klopodas li sen trankvil'tiri kaj levi, sed staras baril'.

Levas kaj skuas per brak' kaj krur'. La ŝtonoj kuŝas fiksitaj al mur'.

Li krias kaj ploras el brusta prem'; krias en plor' kiel kant' en trem'.

*

Mi, sklavo al riĉeca ŝajn', animon vendis por eta gajn'; por jena povra pec' de ter'juris mi min al eterna sufer'. Havenon kaj hejmon ne trovas mi. Je nom' de Jesuo, helpu min Di'.

Kiu perfidis dum viv' en mond', por tiu sekvas kondamna respond'. Perdiĝis fido, perdiĝis renom'. Troveblas neniuj amikaj dom'. Senvoja nun, kaduka mi! Je nom' de Jesuo, helpu min Di'.

Jen translokiĝis partiga ŝton'senhoneste de mi pro mon'. Rompiĝis fido, rompiĝis vort', nun senamika mia sort'. Ne trovos patran sinon mi. Je nom' de Jesuo, helpu min Di'.

ILI VOLAS PRENI ŜIN

La lunluminoj

Dormas en vintro la tera sin'. Juna betulo en prujna lin'kvazaŭ arĝente muldita, staras kiel el stela glim'.

Dormas en vintra somno la ter'. Lumas la lun' en ĉiela sfer'. Mitoj da diamantoj klimas sur branĉoj en frost-veter'.

Tuj ekbrilas radioj sen fin', kiam la branĉoj movas sin. Kvazaŭ vivas la boskosub gemoj ŝutitaj super ĝin.

Injo sen sens' kaj pens' dum star' gapas al tiu arĝenta klar'; subite ŝi vidas inojn; dance iras la hela ar'.

Hela aro en ronda ir' paŝas silente en ŝveba gir', kvazaŭ sonĝe dancantaj laŭ tintil' kaj arĝenta lir'.

Kreis ilin aera pal'; el luna krep' estas rob' kaj ŝal', kudritaj per stela brilo, kaŝas mametojn karesa vual'.

Laŭdorse falas flagranta harar', glima kvazaŭ arĝenta ar'. Super la palaj vangojen stela sonĝo okula par'.

Sunon ne spertis ilia vid'; dancas la juna aro sen rid'; rigide nur ili ridetas. Dormas la trajtoj en sia frid'.

Injo staras kvazaŭ en tranc', rigardas sonĝe al tiu danc'. Kapklinas ili salute, kaj dissolviĝas en bruma trans'.

Profanado

Ŝi tristas, la knabin', en tim' de io; frostiĝas ŝia sin' de sombra scio.

Ĉu baldaŭ loĝu ŝi sur draŭg-insuloj? Ĉu celu nun pri ŝila in-junuloj?

Ŝi brulas en torpor'eĉ kiam ventas. Pri pika brustdolor' ŝi ade sentas.

Ĉe brutoj dum paŝtad' ŝi rev-langvoras, sencelas en vagad', ne plu memoras.

Dimanĉon kun patrin'al kirk' ŝi iras. Per sankta vort' l' anim' ĉu refortiĝas?

Alrulas el la mar' la nub' pluvadon. Obtuzas nebular' sonorigadon.

Ŝi vage tra tombej' en tristo venas. Jen osto en herbej', kaj ĝin ŝi prenas.

Solene ĉe la sin' ŝi tuj ĝin kaŝu. Fantomojn el l' anim' ĝi nun forĉasu.

La postulanto

Sur lito ŝi dum nokta hor' aŭskultas kiel vent' kun plor' la domon ĉirkaŭblovas. La tempo lantas dum la ir'; pro brulo jen, jen frida ŝir' ne dormi Injo povas.

Kuŝanta en premiga tord'ŝi aŭdas frapon al la pord';ŝin atentigas tiu.Demandas ŝi: Ĉu estas hom'en ĉi vetero ekster dom'?— Sed ne respondas iu.

Irante tien fojojn trineniun tamen vidas ŝi.Ŝi timas ion fian,kaj sub kovrilo en la lit'preĝadas buŝe sen hezit'tri fojojn «Patro Nia»-n.

Dum kuŝas ŝi je ŝvita brul',ĉe l' lit' aperas draŭga ul'.Ĉu venis li tra l' planko?Li staras blanka kaj sen vort'kaj lamas per pied' sen fort'ĝis ĉe la lita flanko.

Potenca forto de l' mortint'sentigas ŝin paralizint'.La gorĝo sufokiĝas.Per frida man' li palpas ŝinĝis ene ĉe l' premita sin'la osto ektuŝiĝas.

«La mia!» raŭke krias li,«konsekran ŝloson rompis viper ŝtelo de ostero;revenu kaj remet u ĝin;de l' draŭga fato savu minal paco en la tero.»

Li malaperas; el horror'vekiĝas ŝi kaj kun ĝemplor'ĉe panjon sin enŝovas.Pro ties milda komprenem'ŝi pacon post la kora prem'kaj dormon baldaŭ trovas.

Ekstere daŭre blovas.

En la nebulo

Ĉe vitro staras ŝi dum pluvet';Ĉe l' sin' kaŝiĝas la draŭg-ostet'.

Denove ekfridas bruste angor'.Kirkveston surmetas ŝi en fervor'.

La oston ŝi volvas en tukon de lin';al kirko ŝi tuj rapidigas sin.

Neston ŝi fosas en tomba ter',sed je rigard': neni u oster'!

Konfuzis ŝin iu sorĉa truk',ĉar for estas osto kaj for la tuk'.

Fridiĝas ŝi nun, ne estas ĝoj';ŝi fosas kaj serĉas sur tomb' kaj voj'.

Sovaĝe ŝi fosas, l' anim' en panik';ŝi fosas ĝis sangas unga radik'.

Ŝi serĉas ĝis ŝvelas la man' en dolor';nenion ŝi trovas; for estas for.

Brueto de paŝ' en tombeja angul'.Skuata de rido jen staras grizul'.

«Por vi merite! Ho-ho! Hi-hi!Hieraŭ forgesis vi lakton por mi!»

For li estas sur vigla krur'.Hurlas la vent' laŭ kirka mur'.

Sola ŝi staras; for la gnom'.Frapas la vent' al la kirka dom'.

Murmur' el tero atingas ŝin:«Osteto mia! — — — Redonu ĝin — —»

Ŝi kion faru? Kien la kur'?Nebulas sombre ĉe l' kirka tur'.

El tomb' etendas sin krifa man'.Ŝi krias pro timo, kaj ek elan'.

Injeto malsana

Pro febro ŝi deliras;tage kaj nokte doloras.Vartas ŝin Panjo laŭ la pov';silente por Injo ŝi ploras.

«Vi alta Dio supre,ne ŝarĝu sur min ĉi tion!Vi scias ŝi estas la lasta por mi.Ne prenu for de mi Injon.

Fil' mia velis transmaren;li ne estis knab' estiminda.Iris urben plej aĝa filin';Ŝi nun estas ĉies preninda.

La dua filino mortis;rompis ĝi koron mian.Povra, bona Lizabet',ne ĝuus vi vivon vian.

Nun mi ne havas pliajn;indulgi min grace vi devos.Lasu mian Injeton en pac'ĝis min el la mond' vi ricevos.»

Injeto kuŝas delire,lamentas en halucinoj.Kun monstroj kaj draŭgoj baraktas ŝi,murmuras pri lunluminoj.

Neĝoŝtormo

Peze bruas, rompiĝas kaj krakas,sombriĝas pro neĝa falado;alteje nubiĝas, glacioj knaras,elmare hurlas tondrado.De fortoj senbridaj la tero premiĝas;kaj frosto krevigas, ŝtormĵetoj ruliĝas;kaj voj' kaj ej'kaj ĉiu pasejde neĝaj dunoj fermiĝas.

Kaj lupoj ululas en altaj krutejoj,kun ŝaŭma sang' ĉe dentaro.Embuskas la niks' sub glaci' en fluejoj,kadavre fetora la flaro.Tra mara ŝaŭmo draŭgo kaŝiras,hurlante en ŝtormo, mokante alkrias;rikana rideg';al li la predeg'!Per kadavroj la bordo pontiĝas.

Ĉiel' kaj altej' kaj la grizaj ŝtonegoj kovriĝas per neĝa blovado;kaj fale bruas en mont' kaj rokegoj,kaj bolas sur ŝer' kaj ĉe kabo.Pro fortoj senbridaj la mond' dezertiĝos,kaj ĉio ŝiriĝos kaj ekneniiĝos;kaj best' kaj hom'sin ŝirmas en dom'.Ĉu vivo nun estingiĝos?

Ŝi kuŝas gestante en plend', Injet';ekstere ĉio griziĝas.Rigardas ŝi time tra fenestret';teruraj ogroj vidiĝas;Injeto febre trepidas.

Kiel montaj ombroj ili laŭ ŝajn'kun kapo en nuboj iras.Ĉielon kaj maron kaj ĉion ajnili turnas kaj trene tiras,kaj ĉion per koto ŝmiras.

Unu en maro ĝis la tali'el fundo ĝin skue movas;alia sur iu nordeja glaci'el aĉa faŭkego blovas;similan oni ne trovas.

Iu estas en fora nord-uest'nubaron pezan tiranta.Neĝon blovas ogrin' en tempest'el tuta povo spiranta,la junan printempon pelanta.

Sur Skarekula en roka tru',dancejo satana dum Julio,kunsidas vice trolinoj dek dusorĉantaj per raŭka ululoestingon de l' sun' en nebulo.

Se ili atingus al sia cel',por troloj estus konkero;la viv' estingiĝus treme en gel';ekregus mallum' sur la terokaj kovrus ĉion glaĉero.

Ridetas la sun' super nub' kaj nebul';indulge toleri ĝi provas;atingos ĝin nek ilia ulul'nek sorĉ', kiun ili kovas; —lerni ili ne povas.

La drako

Pia-Per amas la mondon ĉi;bienojn kaj kampojn kolektis li,sufiĉe ricevis neniam.La Haŭgastad-ejo, de panjo bien',en hume mola, fekunda teren',ĝin havi avidis li ĉiam.

Ĝi estos nun baldaŭ je lia dispon'.Vidvinon li prunte helpis per mon'por porti la edzon en tombon.Kreskadis per rentoj la ŝuld' laŭ esper',printempe okazos aŭkcia afer';akiros li jen la ĉiomon.

Trunkege dika en iu tag'li sidas sur benk' postulante pri pag':«Ne plue de mi vi ŝirmiĝos».Ne helpas la plenda patrino pet':«Nun kiel fariĝos? Ho povra Injet'!Al vilaĝa prizorg' ni peliĝos!»

Sed ĉesas pro timo la veo kaj plor';ĉar kuŝas Injeto sur lit' en stupor',terure aspekta sen senso.Pala sin turnas la maljunulin':«La bieno kun domo, do prenu vi ĝinkun viv' sur la konscienco.»

«Al kio ŝi gapas? Kia horror'?»balbutas Per-Pia, griziĝas kolor',«ŝi vidas teruran ion!»«Infan' mia povra, paciĝu nun vi;nutraĵon ni trovos por ambaŭ ni,— ja eĉ se ŝtelu mi ĉion.»

Injeto siblas en paroksism': «La drako — kun faŭko kiel abism' ...flamanta de kap' ĝis la vosto ...Sinjoro ... Jesuo ... Ho jen la diabl'!» — Kun arĝenta baston' Pia-Per laŭ kapabl'elsaltas ĉe l' porda fosto.

La helpo

Terure estas nokte; la fridaj mortintoj venasĉi tien el la fermita tombej'; kaj ĉiuj ŝin ĉirkaŭĉenas.

L' aeron gestante frapadasper manoj pugne premitaj la ar' kun ridaĉaj makzeloj en faŭk' kaj dentoj grimac-disigitaj.

«Draŭgo-oston vi ŝtelis ...Draŭgo-oston vi prenis ...Fride estas en nia tombej'. Pacon en mort' vi ĝenis ...»

En tima sufok' ŝi baraktas; suferi sin plende tordas; panjo ne havas pacon en kor', ĉar sombraj pensoj ŝin mordas.

La pastron ŝi serĉas por helpo; primajstras li sorĉaĵojn, kaj per la sankta, potenca vort' li ligos malicajn estaĵojn.

En mantel' kaj kolum' la pastro alta ĉelite staras; malicajn fortojn konas li; kolera li tuj ekflamas.

Li legas el sankta libro; preĝe li sorĉi celas: «En nom' de Jesu' mi ordonas je Di', kaj vin el la korpo forpelas.»

Krakego tra l' tuta domo; fumtube hurlo terura; panjo esploras larmojn el ĝojo; ŝi scias sin nun sekura.

Injeto malfermas l' okulojn, tre belajn en blua kolor'; li benas ŝin per la blanka man', kio donas pacon en kor'.

«Benu kaj gardu vin la Sinjor',» li diras la preĝon dian; «okulo lia prilumu vin, kaj donu li pacon sian!» —

Parolas la pastro al panjo: «Revenos la sano kaj fort'.» Li rajdas sur la fidela ĉevalo for de l' kvieta kort'.

Injeto poste sentimadum kuŝo trankvile mienis. Beniĝu de Di' tiu pia vir'! Li fortojn malicajn katenis.

PRINTEMAS

Je sunsubiro

Leviĝas feoland' el mar'kun pinta mont'.Ĝi kuŝas en vespera klar'ĉe l' horizont'.

En griza volv' mi vidis ĝin,en nub-vapor',sanktejon ĉe la mara lim'en fea for'.

Ĝi dormas, tiu panoram',en sonĝa sorĉ',sed jen la sunsubir' en flam',enorma torĉ'!

Kaj sangoruĝa sob la tag',purpura ŝvel',en glim' kaj arda ekflamad'kaj en fabel'.

Glacia brulo en kulmin'kaj or-torent'!L' aer': ardej'! Kolor' de vin',smerald', arĝent'!

Forvelkas flam' sur pala rand'en mara ond';serenas ree feoland'ĉe l' horizont'.

Dum laca vag' ĝi logis minpro pac-sopir',sed tiu land' nur montras sinje sunsubir'.

Printempa tag'

Ho jen ĉiel' en pur' kaj sun'.Benata mi, printempas nun.Jen ludas viv' en land', laŭ strand';Libera mi el la malsan'.

Ho, kian tagon donis Di'!Al monta pinto vidas mi.Sur mar' aera diafan'min benas per sunluma ban'!

Aŭdiĝas kant'. Mi vidas: Jenalaŭdo alte en seren'triladas en la blua hel';atingos baldaŭ al ĉiel'.

Flugile remas tra la klar'la mevo elen super mar'.Trilad', kvivito, pepo, kant'en arb', arbust', sur kort' kaj kamp'.

Ho, nun la sun' karesas minper varmoflu' ĉe dors' kaj sin',kaj ŝvebas milde la brizet'de l' sala maro en blovet'!

Jen ĝermas tig', burĝon' en ŝvel',leviĝas suko sub la ŝel'.Ho, dolĉa sent'! Vekiĝas ĝi ...Beate juna estas mi!

SOMERO EN LA MONTARO

Sur monta vojeto

En tim' mi iras en montar', l' animo en sufok'. Ho-hu! karcer' de terurar' por mi nun tiu lok'!

Malvastas brust' sub peza prem', ne spiri povas mi. Pensadas mi kun tima trem': La pint', ĉu falos ĝi?

Jen blokas roka mura front' por vid', anim' kaj sens'. Per griza kruta krest' de l' mont' bariĝas mia mens'.

Izola mia stato nunsen freŝa mara vent'. Obtusa estas la rezon' de kri' el roka fend'.

Se for de roka sovaĝej' mi turnas min en tim', tuj baras blua krut-ŝtonej' jen por la vido-lim'.

Ho-hu! Mallum', premiga sent'! Fridiĝas je genu'. Kaj hu! Dezerta mortsilent'! Kvazaŭas tomba tru'.

La ĝentila knabo

Ĝis nun do servis Jon en la paŝtejo, plej aĝa fil' de Amund en la Brot; vidiĝas la bien' en montfendejosur ŝtupo en la montoflanka krut'. Por li finiĝis servo de paŝtad'; li, plenkreskul', dungiĝos por falĉad'.

Vizaĝon lian junan plibeligashararo hela, densa ĉe la frunt'; sur lip' lanugo kreskas kvazaŭ punt', kaj en la buŝo blankaj dentoj ridas. Li lerte saltas kiel kapra id'; moleston li prikantas nur kun rid'.

Li akompanos ŝin en tiu tagopor montri al ŝi vojojn en l' altej'; konata estu ja la sovaĝej' por ke ŝi ne eraru dum la vago. Kaj konu ŝin ja ankaŭ la brutar'; fremdulon ne tuj fidas la bestar'.

La grego estas en l' altej' pelata. Pli pura la aer' ol iam ajn; rokaron eĉ vestigis sankta ŝajn' en glim' de lumo el ĉiel' portata. Profunde spiras ŝi dum sia vag' kaj suĉas vivon el ĉi dia tag'.

Li kantas, fajfas, drivas, babiladas, jen knab' en embaras', jen saĝa vir', pri suno kaj vetero dum ventadas, pri montoj, brutoj en la sama spir'. Rakontas li pri besto kaj bestino; pri «Dokka» multe, sonorilbovino.

Libera sentas ŝi sin amikin';babilas same pri hazard-temaro.Ridaĉa, frida li ne montras sin,ne kiel knaboj en la vilaĝaro.Li ŝin ja simple, bone, rektenomas;moknomon ŝian ŝajne li ne konas.

Li montras al ŝi rokojn kaj la rojon,kaj ŝtonon, kiu sorĉe turnas sin,kaj la krutejon kie avo fojonmortpafis al rapida boacin';sed en la boske bela betulej',ho sciu, iam estis urs-kuŝej'.

Pri troloj duonŝerce ŝi demandas.«Ho jes!» respondas li sen iu mok'.«Ja loĝas iuj kaj en mont' kaj rok';sed multe pli ĉirkaŭe vage plandas.»Sciiĝas nun ke saĝa estas Jon;li tiras libron el la poŝa fon'.

«Vi eble kredas ne ke trol' troviĝas?»— kurbigas lipon trajto de malfid' —;«por pli ol unu en memor' teniĝas,ke trol' montriĝis al okula vid'.En tiu libro ion trovis mi!Ke vero estas, tion vidos vi.»

Apenaŭ povas ŝi la ĝojon regi.Malantaŭ ŝton' troviĝas eksidej'.Trankvilas la brutaro sur paŝtej'.Sekuraj ili do komencas legi.Tenera iĝas antaŭ Jon l' okul'.Ŝi lernas nun, ke belas knaba ul'.

La libro estas nigra kvazaŭ ter';laŭ legkapabl' ne ofte li ĝin legas.Pri niks' kaj trolo estas la afer',kaj pri la vero ili persvadiĝas.Atente ŝi aŭskultas lin en fid':«Ho, ĉu ne vero!» krias ŝi kun rid'.

Nun povas «tiu» moki pri l' afero;jen laŭ la libro kredas ankaŭ Jon;— kaj kune sidas ili ĉe la ŝton';rakontas ambaŭ tute en libero,manĝetas dume en komuna ĝu';reiron Jon forgesas, sidas plu.

La strangan vorton mire aŭdas lipost ĵuro ke li tion prisilentas,ke ankaŭ al ŝi mem ja en vizi'transmondaj uloj foje sin prezentas.Li donas manon, plena de estim'.Kaj kiom ŝi rakontas! Sorĉ' sen lim'!

Daŭrigas ili sen atent' pri hor'.Malfrue estas, certe post la sesa.Salutas gregon li je iro for;kaj karan «Dokka» tuŝas man' karesa.For estas li, kaj sola restas ŝi.— Sed «Dokka», tiun prenas ŝi al si.

Sur la paŝtej-monteto

Sovaĝan krutejon mi vidas en tim',ŝtonejon kaj rokan aron,sed dank' al Di'! se mi turnas min,mi povas vidi la maron.

La glima strio en blua hel',ho, benu ĝin dia mano;benita estu ŝipo sub vel',benita ĉiu ŝipano.

Sed hu! tiu monta, ŝtoneja fatras'en krutan deklivon ĵetita, —kvazaŭas rankora trola amas'de fulmotondro rompita.

Kaj dorso kaj kapo kaj elstaraĵ'kaj pintoj en roka rompiĝo,jen de gigantoj ilia krevaĵ'post sunhela mateniĝo.

Al dioj kaj anoj de l' lum' en atak'ili hakis kaj korne batalis,sed laŭ krutejo kun fumo kaj krak'kiel ŝtonoj malsupren falis.

Kruce kuŝas en roka ostar'brakoj ĉe korpoj dikaj.Miksiĝas kunen en mond' el ŝtonar'torsoj kaj kapoj rompitaĵ.

Senondaj sub kruta monto-mur'jen dormas lagoj bistraj;perfide gapas el funda obskur'glimantaj abismoj sinistraj.

Dum sombro sub pluvo la niks' en vesper'ellage hurlas pri sorto.Resonas de l' nuda mont' en l' aer'aŭgur' pri baldaŭa morto.

Ho-hu, mi kaptiĝas de ega tim';altiras min sorĉ' en rokaron.Sed dank' al Di'! se mi turnas min,mi povas vidi la maron.

«Dokka»

Ho, Dokka, Dokka, kara vi bovin';vi, kiam el okulo fluas larmo,karesu min per via vanga varmo;vi sekvas en dekliv' kaj laŭ ravin'kaj tiam mi ne sola sentas min.Vi ĉe mi estas en sopiro-svarmo.Kaj kara vi, ĉu estas misrezon',ke nun do rajtas pensi mi pri Jon? —

Injeto sopiras

Prizorgas ŝi en kuira ej',patrin';maljuna, griza ĉe l' forna ej',patrin'.Ke kato estus mi, hejma an',kares-premanta sin kiel infan'al patrin'.

Ŝi serĉas manĝon el sak' kaj kest',patrin';kaj ĝin pretigas por hom' kaj best',patrin'.Ke estus mi kiel dika Briten rida babilo ĉe forn' kaj marmit'kun patrin'.

Trankvile iras sur hejma ter'patrin';kaj sekvas post la pied' paser'.Patrin'!Ke estus paser' mi sur ŝia voj'saltanta dance en vigla ĝoj'ĉe patrin'.

Ŝi ŝatas sunon sur sulka vang',patrin'.Ŝi ŝatas brizon freŝiga al sang',patrin'.Ke estus mi dolĉa mara vent',karesa por la anim' kaj la sent'de patrin'.

Sed dorson ŝian atakas dolor',patrin',pro blovo tra fendojn dum ŝia labor',patrin'.Ke estus mi la malnova pord',mi ŝirmus ŝin kontraŭ vento de nord',por patrin'.

*

Mi scias bone pri ŝia mens',patrin',dum staras ŝi ĉe la forn' en pens',patrin'.Kaj ofte penojn forgesas ŝi,rigardas elen en tim' pro mi,faras patrin'.

Forgesas penon dum biena far'patrin',en tim' rigardas ŝi al montar',patrin'.«Kiele fartas nun povra Injet',kuranta anhele sur rok' kaj montet'?»pensas patrin'.

Ke scius mian sopiron vi,patrin'!La hejm-paŝtejon ekŝatis mi,patrin'!Monteje mi iras dum taga hor',kaj endormiĝas vespere en plor',ho, patrin'!

Al ĉio sentas mi min fremdul',patrin'!De ĉie gapas nur frida okul',patrin'.Ne estas vivaĵ' kiun fidu mi,neniu troviĝas por mi kia vi, —mia patrin'!

Ke viglus iom la tempa ir',patrin'!Minutojn nombras mi en sopir',patrin'!Ke povus paŝi sep-mejle mi,kaj sidi etan momenton ĉe vi,mia patrin'!

Mirtelejo

Ho vidu, bluiĝas jen!Restu nun, ŝaf' kaj bovino!Ho hoj, kia bera plen'!Svarma mirtela senfino.Egalon ne vidis mi!Jen bono dum monta vag'!Mi manĝu ĝis sat' tie ĉi;Ni restu ĝis fino de tag'.

Ho nam-nam, kia dolĉaĵ'.Ho-hoj kiam tiel fariĝas! —La ej' estas tuta bluaĵ'!Por pluraj tagoj sufiĉas.Tia frand'! ĝi freŝigas min!Kvazaŭas en reĝa kastel'.Gusto de bona vin';jen kiel en dolĉa fabel'!

Se venus la urs', la grandul'!lok' devus esti por ambaŭ.Mi cedus por tiu plandul',giganta, timiga ja ankaŭ.«Bonvole,» mi dirus nur,«ne restu en sinretenem'!Ja estas nura plezur';vi servu vin laŭ la em'»

Se estus la ruza vulp',gustigus mi lin per bato;mortbatus mi lin pro kulp',eĉ se estus li frato de l' papo.Ŝteliĝas ja kio ajnfar tiu maroda best'!Li bone kondutas laŭ ŝajn'sen honto pro senhonest'.

Se estus la lupa poltron',malica kiel kasisto,per mia betulo-baston'ricevus frapon ŝtelisto.De mia patrin' sen hezit'ŝiriĝis besto kun id';mi traktus lin laŭ merit',se pelus lin nun avid'.

Sed se la ĝentila junul' altejen venus tenere, ricevus li de la inul' sur buŝon alimaniere. Babil'! kion pensas mi! La tago jam pasas al fal' ...atendas brutaro ĉi; —sopiras Dokka pri sal'.

Renkonto

Dimanĉon sidas ŝi en la dekliv'; kaj pri espero dolĉaj ŝi pensadas; la koro peze en la brust' frapadas; vekigas revoj al tremanta viv'. Miraĝo jen sur montokresto ŝvebas; ŝi arde ruĝas; — jen la knabo venas.

Ŝi foren volas en konfuz' kaŝiri; en sorĉ' ŝi tamen turnas sin al li; salutas ŝi al li kaj li al ŝi, kaj staras ne sciantaj kion diri. Vortumas fine ŝi el sia mir': «Sed kara vi ... altkreska kiel vir'!»

Ridetas ruĝa li, streĉante kruron: «La knab' ne devas resti malfortul'; laboru li ja kiel plenkreskul'.» — «Kaj jen, imagu, vi ricevis barbon!» «Antaŭe ĝi ja tie estis; sed eble ĝi nun iomete kreskis.»

Elaste li malantaŭ ŝton' glitfalas. El poŝ' manĝaĵon tiras li kun rid', ofertas knabĝenite por divid': «Jen ovoĵ! Ilin mi por vi kunhavas.» Kun rid' ŝi ĝuste antaŭ lin sidiĝas; la brust' en trem', l' okul' al li fiksiĝas.

Jen sidas ili tiun varman tagon. Li provŝercante logas ŝin al rid'. Ŝi ĝojas kiel sur la branĉ' birdid', sed povas ne vigligi babiladon. Nun kiam ĝustas tempo por feliĉo, ŝi sidas tie kvazaŭ en fremdiĝo.

Li petas pri rakont', sed estas fornun ĉio en vizio vidigita, perdiĝis tute elen el memor', kaj ĉio estas kvazaŭ forgesita. «Ne troloj! Ili mem prizorgu sin. Prefere volas mi aŭskulti vin!»

Volonte li pri Skarebrot rakontos. Elkreskis tie li sur hejma ter'; ja tie ili kvar bovinojn nutros; ordigos li laŭ sia manier'. Ŝi ĉiun opan vorton povas fidi; demandas ŝi, ŝi ĉion volas scii.

Vagade ili laŭas riveretojn kun karesema ŝaf' kaj kun bovin'. Pri greg' senzorgaj sentas ili sin. Permane kaptas ili la fiŝetojn, kaj roste fritas ilin sur ardaĵ', kaj malplenigas sakon da nutraĵ'.

Ho feliĉeg'! — se tio nur ne estus, ke nek la knabo nek la junulin' kuraĝas en liber' rigardi sin; ĝeniĝas li, sed viro esti devus. Se ilin ne aparte tenus tio, ho, kiel bona povus esti ĉio!

Nubiĝas nigre, pluvas sur paŝteĵ'. Bruegas tondroj sur la monta kresto. Sin ŝirmi volas ĉiu hom' kaj besto; en roka kavo estas rifuĝeĵ'. Ne granda estas ĝi sed vizitinda. Ĝin ili trovas loko ensidinda.

Kaj jen vesperon je la sun-ekkuŝ'pli kunen ilin la sopiro pelas; impulse juna brak' al kolo celas; kuniĝas sentoplene buŝ' al buŝ', kaj kapturnige ĉio sin transformas; feliĉa ŝi en lia brako dormas.

Kaprida danco

Ho hipp kaj hoppekaj tipp kaj toppeen tago ĉi; kaj nipp kaj nappe, kaj tripp kaj trappeen rondo ĉi. Kaj estas am-en-sun', kaj estas flam-en-sun', kaj estas tril-en-val', kaj estas bril-en-val', kaj en ludemokaj kriegemoen tago ĉi.

Kaj tir' ĉe nukokaj fal' sur ŝtupo, pied' sur ej'; kaj formu ringonkaj ekan svingonjen en herbej'. Kaj estas ĝu-en-sun', kaj estas tju-en-sun', kaj estas glim-en-val', kaj estas mim-en-val', kaj estas tirlokaj roĵa lirlokaj paca ej'.

Ho tapp kaj tapokaj puŝ' en kapo, ĝin havu vi. Kaj snipp kaj snufokaj kis' sur buŝo, ĝin prenu vi. Kaj estas rul-en-ring', kaj estas sul-en-sving', kaj estas salt-en-danc'ne estas halt-en-danc', kaj estas hej-hoj, kaj estas salt-hojkaj tra-la-ti.

Amo

La vigla knab' sorĉe min amigis, min kvazaŭ birdon enkatenigis. Triumfas knabo en amfier', kaj min allogas ne plu liber'.

Min ligu firme per ŝnur' el fero. Subigu ĉene min al sufero. Ja, tiel premu min nun al vi, ke l' tuta mond' iĝos for por mi.

Se majstrus mi sorĉkapablon mian, mi kreskus tuj en animon vian. Mi volus kreski, karul', en vin, por ĉiam esti nur via in'.

*

Vi loĝas ene en mia koro. Vi regas sola en la memoro. Pensetoj ĉiuj, la tuta mi, susuras nure pri vi, pri vi.

Se suno brilas de la ĉielo, mi pensas vi estas ĝia celo. Se vesperiĝas, tag' velkas for, ĉu Injon havas vi en memor'?

Se vent' alteje vagade blovas, hararon vian ĝi taŭzi povas. Se gutas pluv' kiel kaŝa plor', vin malsekigas ĝi dum labor'.

Ho ke la horoj rapide pasu! Ke tempo tagojn forpele ĉasu! Ĝojkantas tamen mi pli kaj pli. Hura, dimanĉon ja venos li!

Arbar-ĝoja

Ho, povra vi leporo, vestiĝis silke vi, pri via tim-angoronur scias nia Di'. Laŭ kia cel' saltadas vi, eta senpensul'? Vi kion postkuradaskontuze al betul', povra ul'?

Somero nun boniĝaskun dom' en arbustej'; burĝonoj ŝvelaj iĝasen via leporej'. Ni estu ambaŭ gajaj dum nuna suntempet'; kaj ambaŭ pigre ĝojajni kuŝu en bosket' por dormet'.

Vi estas ĉarme bruna en la somera rob'; sed estas vi tro junapor esti mia knab'. Ho, ke vi min ĝojigus saltante en dekliv', kaj ambaŭ amikiĝuni dum la tuta viv', tuta viv'.

Demando

Li lante tabakon maĉas, la maljunulo en Skar': «Stranguloj nur babilaĉas pri trolo kaj sorĉa far'.

Se tio, laŭ ili reala malbono kaj mava mister', ekzistus kun forto fatala, ne eblus vivi sur ter'.

Sorĉiĝus ni suben kaj norden, malsanaj en kapo kaj brust', subiĝus al ili ni hordensur tuta la tera krust'.»

La tuje parola edzino respondis al li en rapid': «Permesu ridon je l' fino, ĉar estas nun tempo por rid'.

Vi viroj ĉiam ŝajnigas ke ĉion komprenas vi; sed ĉion mikskonfuzigas vi, spite al via sci'.

La troloj devige sklavaskiel gnomoj en ter' kaj sur fjord'; ne timu, — mi certe pravas, — kvankam estus grandega la hord'.

Eĉ se multaj samkiel herboj kaj kun forto de akvofal', tro kadukas iliaj cerboj por atenci al ni per batal'.

Atentas ili malmultedum sia brua kriad'. Kondutas ili stulte, sen ajna kuna agad'.»

Bovin-voko

Bovino bela, ho mia bovin'!Vagad' somera ĝojigas nin;plej bonas herbo sur monta ter';en val' torente fluas river'.La vent' blovtuŝas kun milda ben';susuras ĝi de la mont-seren'.

Bovino bona, ho mia bovin'!Deklive vi sentos komforta vin;lirladas akvo en fonta fluej',kaj milde ombriĝas sur mola herbej'.Paŝtadas huldoro en tiu dekliv';kaj al ni ambaŭ ĝueblas viv'.

Bovino dolĉa, ho mia bovin';tempet' plezura favoru nin!Serpenton mordantan forĉasos mi,kaj muŝojn kaj kulojn mi pelos de vi.Kaj pasos valse facile la tag';vin gratos mi dum ripoz' post vag'.

Tintilo via je sun-subir',nin loge gvidas dum hejmenir'.Plenmama venos vi al hejma ej',salŝtonon lekos vi ĉe l' kuirej'.Melkita kuŝos vi por rea maĉ';kaj sonĝe dormos en fid' kaj pac'.

Bovino bela, ho mia bovin'!Prisonĝu paŝtejon kaj ankaŭ min!Feliĉaj ni kantos dum tuta somer';aŭtuna paŝtej' estos hejma ter'.Jen venos bienen vi kiel reĝin',kaj ĉiuj krias: Ho kia bovin'!

Malbona tago

Ŝi nombras tagojn ĝis sabat-vesper';dimanĉo venas; li promesis ĵure,ke eĉ se pluvus ŝtonoj el la sfer',li al paŝtejo tamen venus kure.Dimanĉ' forpasas en nebul' kaj pluv';en plor' ŝi sidas sola sur la tuf'.

Neniam li perfidos, scias ŝi,eĉ se la malfeliĉo ilin provus,ĉar tiam ŝi ne plue vivi povus,sed sinkus, kaj ŝin morta trovas li.Sed peza estas ŝia juna koro,kaj haltas ne la larmoflu' dum ploro.

Ŝi hejmen venas en aŭtun-vesper'.Pro timo preskaŭ ŝia koro krevis.La tutan tagon estis pluv-veter',kaj kvazaŭ en inund' ŝi vadi devis.Kuŝejen nur rapidas ŝi sen son';ripoz' estas nun bezon'.

Sed ĵus la avo venis de l' preĝejo;kaj nun kun pip' en buŝ' rakontas li:«Feliĉos Jon se nun fariĝos ŝila lia, tiu in' de bonstatejo.»Ŝi sentas pikon en la brust',Injet',kaj svene ŝi ŝancelas al benket'.

Ŝi aŭdas pli ol kion ŝi deziris;ŝi aŭdas ke la knabo, ŝia stel',logata de alia dolĉa cel',kun ajnaj belaj inoj flirte iris.Sed nun li iras ruze por la svat'al tiu in' en Os en riĉa stat'.

Kaj tiu faras sin al Jon aminda; ŝi logas lin malkaŝe kaj sen hont'. Li, kiel ĉiuj, scias laŭ rakont', ke laŭ havaĵ' ŝi estas preferinda. Kaj jen kun tiu ino sole dancas li, kaj por aliaj inoj ne plu ŝancas li.

Injeto — bird' vundita sub flugil' — kun sang' gutanta kiel brula larmo, — sin treme kaŝas per la lit-kovril', kaj febre tordas sin en plora varmo. Kaj brulas vang'; ŝiriĝas korradik'. Nur restas mort'; perdiĝis la amik'.

Ĉe la paŝteja roĵo

Lirlanta, vi roĵ', kirlanta, vi roĵ'! En valo vi glitas en klara blu'. Sur spegula fund', super ŝtona grund' kun loga murmur', kantanta susur', kaj glimas sub sun' via onda flu'. — Ho, jen mi ripozu, ripozu.

Brilanta, vi roĵ', glitanta, vi roĵ', deklive vi fluas sub suna bril'. Kun kluk' kaj gluglad', kun kant' kaj ĝemad' kun rid' kaj ploret' tra betularbaret' dormigas en sonĝon via babil'. — Ho, jen mi sonĝu, mi sonĝu.

Zumanta, vi roĵ', klukanta, vi roĵ', vi havas liton en musk' dum ir'. En ĉi milda sin' forgesas vi vinpro flustra babil' pri granda trankvil'; mildiĝas anime la prema spir'. — Ho, jen mi memoru, memoru.

Plaŭdanta, vi roĵ', fluanta, vi roĵ', dum longa voj' kion pensis vi? Tra dezerta ej'? ĉe arbust' kaj floreĵ'? Dum subtera flu'? Sub ĉiela blu'? Ĉu iu plie solecas ol mi? — Ho, jen mi forgesu, forgesu.

Siblanta, vi roĵ', frustranta, vi roĵ', kantete ludas vi en arbar'. Al suno ridet' kaj rid' en fluet' kaj longa la vag' por rivel' al tag' — ne kantu pri mia pens' en amar'. — Ho, ke mi ekdormu, dormu. - - - - -

Dolĉe kiel plor' sonas harp-sonor'; logas ama sent' en somera vent', en la milda lul', en la flua rul' dormas for ĝi en trankvilo; vekig' el silent', ŝvelas en potenc', kiel ŝaŭm-susur' en la mar-murmur'; el la dorma ĉarm' ŝvebas tona svarm' amovarma, dolĉa trilo

Kun arĝentaĵo ĉe harar' ondanta, kun broĉ' vibranta ĉe la mamoj rondaj, ruband' arĝenta sur la brakoj bronzaj, jen huldro ĉe betulo flaviĝanta.

«Pro perd' de perfidul' ne ploru vi, kaj ne plu iru kun amara penso; memoros ĉiam li per sia menso, kaj pro konduto fia pentos li. Ĉagren' plej peza fine eĉ venkiĝos; sur bela suna mont' vi renkontiĝos.

Sed kiu en aflikto post perfid' en sia kor' sopiras en doloro, ŝi scias kiom longa estas horo; —vi sekve ne plu restu en rigid'. La kordojn ofte aŭdis vi sonori; amik' sopire devas pro vi plori.

Deziras al vi bonon mia frat'; kaj nokte lia kant' en val' plendadas; mizeranime tagojn li vagadas, sopire vin serĉante pro la ŝat'. Ne devas vi forturni vin en fridode tiu kiu amas vin en fido.

Jen kiam vintrostelo montros sin, ni Antaŭ-Julon estos festenantaj, kaj nevideble monten levos vin; ne timu, ĉiuj estas vin ŝatantaj. Pri tio scias ne la vilaĝaro. Amik' reportos vin el la montaro.»

La huldoro velkas for en ĉeaj platoj. Vekiĝas el duona dorm' Injet', kaj flugas sammomente for videt' per de lagopo bruna flugilbatoj. Ŝi gapas per l' okul' en sonĝo ĉi. Memoroj hejmaj tuj forgesis ŝi.

SUR TROLA MONTO

Vekiĝas

Velkas luno post volba ir'sude en horizont'; steloj en sorĉa, svarma delir' falas el stelara pont'. Blovas el nordo la vintra spir' super la montoj.

Nigra nokto vastigas sin, vindas la teron en brum'; elen el fendoj kaj el ravin' flagras blua vaglum'. Rid' resonas laŭ roka spin' super la montoj.

Tranĉe ŝira trumpeta signal' krias de l' monta pint'; viglas kurbuloj en kruta val', rampas el rok-labirint' subteruloj al festival' super la montoj.

Vintra lumo vekiĝas en nord', streĉas la verdajn arkojn, pelas susure sub volba pord' antaŭen frostajn sparkojn; brilas arĝente la flamo-hord' super la montoj.

Treme pafiĝas la flama glim' super la alta monteĵ'; ŝtale frida glacia senfin' radias sur kruta rokeĵ' vibre en danc' sur roka spin' super la montoj.

Streĉas sin lum' super pint-kulmin', ligas radiojn en nodon, ŝutas sin dise vibra glim', formas tendan volbon. Staras jen hal' el radi-gobelin' super la montoj.

Kiam ordiĝis tiu pulul';kraĉas trumpeto sonegon; —venas bruege la nigra ul',eksidas li sur la Ŝtonegon.Fajre ardas lia okul'super la montoj.

Jen alvenas draŭgoj,klakas krur' kaj brak';donis sin ili al Hida Ul';sekvis eterna plag'.Fride susuras kant' el tumult'super la montoj.

Venas saltanta kaprulo,fulga nano kaj gnom',nikso, draŭgo kaj reaperant'el sia enmonta dom',ĉiu sepmejloj-paŝa kurant'super la montoj.

Venas trol' kaj trolinotra dezertaj altejoj,rajde sur balail' kaj baston'sorĉante per akraj blasfemoj.Terure ululas la galdra ton'super la montoj.

Kolektiĝis la greganar',praaj kaj ankaŭ novaj:grake grincas el trola ar',el ĉiuj gorĝoj gnomaj.Ridoj salute ruliĝas de l' ar'super la montoj.

Kiel sur ŝaŭma maro ŝtorm'la nigra kanto vekiĝas;per tonoj el la tombeja dorm'glore la reĝ' salutiĝas;kreske, disflue ĝi velkas forsuper la montoj ...

Ili salutas sian estron

Sidu vi en prosper',Altulo en Infer',reĝo de l' ter'!Estu potenca vi!Venke progresu vi!Mondon suben premu vide la sud' al nord'!

Per via anatem'sob malamik' en ĝem',en trem' kaj tim'!Sed via sindonant',senbrida diboĉant',laŭ sia voj' de mensogant'estu en estim'!

Per la satana nom'blasfemu ĉiu hom'tri fojojn tri.Vi fojojn tri kaj trinin estros jen kaj ĉi;havas nin ĉiujn viĝis la tempa fin'!

Ekzameno

Skribas kun libro genue Satan'per ruĝa sango la nomojn;li kriptе listigas per krifa man'vivajn kaj mortajn homojn.Laste ĉiu nova an'en la gregon.

Preĝon antaŭ la nigra ul'ili starante raŭkas.Por ĉiu junulo kaj eĉ oldul'Diablo la gorĝon faŭkas.«Ĉu volas vi nun je Antaŭ-Jul'en la gregon?»

Unuanime per jesa dir'kriĉas la kongregacio.Vice ordigas sin in' kaj vir'kvazaŭ por konfirmacio.Prov' postuliĝas antaŭ enir'en la gregon.

La nigra katekismo

«Ordonu unua, kia ĝi?»— Laŭ aliuloj kondutu vi.

«Kaj pri la dua, ĉu havas vi konon?»— Malbenu en koro Dion kaj homon.

«Ĉu scias vi mian trian okupon?»— Dimanĉon soru preĝejan ŝtupon.
«Kaj nomu ankaŭ al mi la kvaran!»— Subtenu ĉiam la plej altstaran.
«La kvina?»— Se antaŭas iu, neniam indulgu mi al tiu.
«La sesa?»— Estu interne fiulo, tamen ekstere bela brilulo.
«La sepa?»— Estas la trola feliĉokaŝe ŝteli, kaj vivi en riĉo.
«La oka?»— Plej bona defendo estas mensoga pretendo.
«La naŭa?»— Vi estu rapida ruzul' je flar' de bieno de aliul'.
«La deka ordon'?»— Al najbar' perfid'. Vi ŝatu gajni per ruza insid'.
«La fundon de l' saĝo, memoru ĝin ĉiam!»— Forgesi la akran malamon neniam.
«Kion vi kredas?»— Ĉiam friponovenkas super atencoj de bono.
«Kion vi preĝas?»— Ke fariĝutiel ke l' mondo neniam boniĝu.
«Kion plej kore vi deziras?»— Posedi la mondon mi sopiras.
«Ĉu tiu volo vin tute plenigas?»— Per sango servute al vi mi min ligas.
«Kaj poste?»— Ke l' pakto ĉiujn jarojnvalidu, vizitu mi vian altaron.

*

Genuas nun la nova trol'; eksonas ĝoja kri'; Ŝtormas hurlo de l' tuta
popol', kreskante pli kaj pli. «Li fidas! Li estas de nia skol'! En la gregon!»

Por ĵuro je la sennoma grandul' krifojn Satano eklevas. «El mia potenc' estu vi
potencul'; mi ĵure tion promesas. Eterne mi prenas vin mia subul', en la
gregon!»

Stela falo

Paŝas antaŭen olduloj, inoj kaj poste viroj; Ĉiu raportas el vilaĝar', pri siaj
malicaj iroj; kontenta Satano pri tia far' ridas al ĉiuj.

*

Laponino

Malsanaj mi sorĉas bestojn kaj homojnkaj sendas la muŝojn flavajn;rompas mi pacon, vekas ŝtormojn,fidiras vortojn malpravajn.

Vagantino

Ŝteliston malŝlosi lernigas mi,trankvilon dum murd' al murdisto;la lakton al sango sorĉigas mi,mortfalu la best' ĉe l' melkisto.

Ore vestita virino

Kreskigas mi inter knabo kaj in'malfidon per fia vortero;ja kiam kverelas edz' kaj edzin',forvelkas herbo sur tero.

Malgrasulino

Malicon ĉe viroj vekas mi,per pens', kiu fidon detruas;mi scias ke kiam ekflamas envi'facile mi mavon instruas.

Ĝibulino

Ĝentilajn virojn kun firma sinten'kaj fid' je si mem mi ne ŝparas;malkuraĝigas mi per venen',kaj ilin perfidaj faras.

Strabulino

Transturnas mi vidon de dolĉa in';kontenton neniam ŝi sentu;al trol' kaj vagul' ŝi forĵetu sin,en morton sin tiel lamentu.

La viv' aridiĝas en frida mens',kaj suben la dorso kurbiĝas;la koro fariĝas glacio sen sens',kaj ĉio pri ŝi malsaniĝas.

Sorĉ-kuiristino

Se bebon naskas in' post perfid',pro mia sorĉ' ŝi deliros.Kaŝe al morto velkos la id'.Por Julio mi ĝin kuiras.

Duone nuda trolino

Kuras sorĉita knab' kun miĝis karno kaj cerb' moliĝas;fine bebe vindita lisocece, putre foliĝas.

Virino kun okulvitroj

Mi volas ke velku la viv' en burĝon'; per tio ĝis nun ni altiĝis; mi vekis la inon el stat' de sindon', kaj ŝin postuli lernigis.

Ŝi fortas en sia eltrudem', ŝi ĉion parceligos; kaj se la vir' ne naskas mem, ŝi ne sin edzinigos.

Sorĉisto kun bovlo

Se viron ni ligu al obeem', ne ŝparu ni freŝan bieron; lamiĝu per ĝi lia estra em'; dormigos ni lian fieron.

Nuda sorĉisto

La progresema hom' en labor' malfacile kaptiĝas; —sed per sia perlaborita or'de mi al luks' li logiĝas.

Sorĉisto kun hakilo

Bonstatajn vilaĝojn incitas mial inter-batalado; okjara rikolt' disipiĝas pro ĝiper nura oktaga luktado.

Sorĉisto senzorgema

Senpova la ul' kripliginte sin hakinte for la pugnon; predikas mi pacon al la kokin' antaŭ ol ligi la vulpon.

Sorĉisto kun vergo

Etulojn en monton mi sorĉas sen hont', kaj sklavaj ilin vestigas; ne vidos ili ekster la mont'; per libro l' okuloj kovriĝas.

Sorĉisto kun sako

Sako plena je pek' kaj horor' pezigas la ŝultran paron; per serur' kaj katen' el arĝent' kaj or' mi sorĉis la tutan homaron.

Delire misvoje iras povrul', l' animon turmentas plagoj; sur mola lito tordiĝas riĉul', putrigas lin bonaj tagoj.

Sorĉisto kun skurĝo

Estru mi laŭ propra vol', kaj pensu mi por ĉiuj; antaŭas mi, kaj sekvu popol'; kiel mi gloradu neniuj.

Duvizaĝa sorĉisto

Mi sorĉas la rojon; ne fluu ĝi; krepusko regu la vivon; antaŭen kaj reen volas mi; kaj dekstren samtempe kun liven.

Statas kampar' kiel morta lag' kie strangaj bestoj putriĝos; nenio instigas je nokt' aŭ tag', marĉo ĝi baldaŭ estiĝos.

Ĉeval-hirurgo

Spacan ejon havu etul' kaj estru etulmaniere; sobigas ĉion tiu ul', kaj iĝos en mondo mizere.

Kiu kreigi al granda afer', sidu stulte ĝentile; mi tranĉas, kaj sen sia vira ekster' laboros li poste ŝpinile.

Insidanta sorĉisto

Ofte fatalon spertis mi; nun ruze per sorĉ' agitas; mi inter-malicon vekas per fi', kaj perfide erarigas.

Se gajnas vi ne per honesta far', vi certe fiule prosperos; mi tion instruis en vilaĝar'; per tio ĝi multe suferos.

Viro kun buŝumo

Lernigas mi homojn pri kaŝa perfid' kaj prefero de trompa konduto; similas al mi pli ol unu homid' akceptanta maljuston en muto.

Nigramanteluloj

Psalmojn kaj preĝojn mi en murmur' remaĉas kun evangelio, ĝis homoj kredas: Jen voj' de l' natur'! — kaj forgesas la volon de l' vivo.

Sorĉistego

Altule mi paŝas tra l' vilaĝar', postlasas neniun faregon, ke tiu lerninte laŭ mia far', ne fidu plu iun grandegon.

Eta sorĉisto

Mi havas ilon en mia malfort':Se iu distingiĝas,mi klaĉon per ruza, venena vort'sekrete disvastigas.

Etuloj ĝojas en sia atend',pensantaj etul-malice;grandecon kotŝmiras mi per ofend',kaj sekvos min ili laŭvice.

Skeleto

Ĉiujn ulojn inklinajn al ced'venene mi senfortigas;laciĝas ili pri ĉio en ted';por morti sin ili kuŝigas.- - - - -

*

Satano kun kontenta rid'ĝoje donas inspiron:«Se pluen daŭros vi en hid',la vivo atingos subiron.»Laŭdas li pro sindona fid'al ĉiuj.

Ricevas ili al roba rand'Longvost-ordenon honoran;signifas tiu sulfur-ruband'la atingajon plej gloran;Nigrulo signas per kap' kaj man'al ĉiuj.

Honoro estu al meritul';laŭ aga efik' vi altiĝu;kavalir' aŭ nobel-rangul',aŭ eĉ «pavego» nomiĝu;krife salutas Diabla ul'al ĉiuj.

Petanto

Alrampas vir' kun ruband' sur frunt',la kapo ore kronita;malpura estas mantela punt'ĉar kvazaŭ en koto trenita.

«Sinjor' de Infero, aŭskultu min,mi reĝ' sub turmentoj fobiaj;por rekompenco mi serĉas vin,ĉar estas mi nun el la viaj.

Por multaj estas ĝuinda frand'pacan landon rabi;Ne zorgis mi, perfidiĝis land'kaj popol', kiujn devus mi savi.

Sed poste rabistoj foriris en tim'sen fiero pro sia ago;rikanas popolo en malestim';jen pro la perfid' mia pago.

Mi petas al vi, Sinjor' en ver':forigu nun la signon,ke povos mi levi en liber'la frunton kaj havi dignon!»

Per nomo Satano enskribas lin,kaj ridas el fundo de l' koro;li premas la reĝon stampitan al sin'por kiso al buŝ' en fervoro.

«Dankon, la guston de sulfur'ĉiame mi ege emis.Donis ĝin ĉiu rompita ĵur',kiu
sob liberecon premis.

Kun Judas enskribiĝis vi,laŭdindas tie stari.Pri stampo brula povas mipor vi
nenion fari.

Ĝin vi havos en vivo kaj mort',en rakont' kaj hejmoj subteraj;forigi ĝin povas
neniu fort',eĉ ne la flamoj inferaj.»

Alta gasto

Venas sur falva ĉeval' rajdant',skeleto en nigra mantel';Serpon li firme ligis ĉe
flank',haltas ĉe l' nuna cel';grimace salutas li majstron de Hel,tra la nokto.

«Hoj-raŭ!» li raŭke tusas,«gajon en ejo seanca.Ĉiloke preferas mi loĝi.Altulo!
prezentu sidlokon.»

Satano el seĝo sin levas.Palpas li frunt-rubandon.«Sinjoro frato, bonvena
amik',trovas ĉi tie vi hejmon.Komencos ni dancon kun sving' kaj kik'tra la
nokto.»

«Hoj-raŭ!» la Morto raŭkas;«ĉiame, amik', mi vin amis.Laca vagadas mi
sklavetra l' mond' sur ter' kaj ondoj,kolera al Majstro mi servu,forigi vivon por
vivo.Ne lukris mi gajnon salajran;senpage mi devas agi;se igu mi
senhomiĝon,rapide rekreskas la idoj.Ĉi tie la ĝustan estronkaran mi rekonas;ĉi
eje libersentememi dancu la morto-dancon.»

«Pli ol volonte,» alkantas diabl',«deziras mi al vi orgion;oftege sur vojo laŭ
kapabl'perfidis vi la vivon;kaj sendis homidan rostaĵon por tabl'tra la nokto.

Profitas mi de ĉiu branĉ'kiun vi tranĉas juna.Al certa venko do estas ŝanc'per
nia labor' komuna.Nun akorde ni tretu al danc'.tra la nokto».

Troldanco

Tretadas kun klaka son'ĉevala ŝuo kaj huf';paŝetas piedo sur ŝton',trotiĝas sur
rok' kaj tuf',kaj kvazaŭ monta nebul'blovata de venta ĵet',infestas trola pulul'en
onda impet'.

Knarad' de rusta riglil',fajfad' en truo kaj fend',ĉe pintoj ulula tril',siblado en
frida vent';alteje ŝrik' kaj krieg';de tiu kant' de infer'danciĝas sovaĝa greg'tra
nokta veter'

Tonoj vekigas en vibra trem', kantas susur' kvazaŭ roĵa ĝem'; sonĝoj en nokto
 soras. Klukas ludo el monta rokeĵ'; resonas fendej', kiel sub pluva flu' sur
 altej' amar-sopire ĝi ploras. - - - - -

Jen dancas la gnomo en bela kolor'kun ringoj ĉe l' haroj ondantaj.Li logas
Injeton per danca fervor'kun tonoj ĉirkaŭe vibrantaj.«Ravege por vi!Vi loĝu kun
mi!Ŝpinilon arĝentan ricevos vi.

Foriĝos en kanto kaj lud' la timid',kaj bela la dancon vi tretos;forgesos vi ĉion
de l' vunda perfid'kaj plue eĉ ne suferetos.Pri ajna sopir'je unua dir'vin servos
inar' mia laŭ dezir'.

Kombiĝos de unu la bruna harar',kaj plektos la dua la tufon;beligos vin tria per
kron' kaj perlar',ĉemetas la kvara la mufon.La kvina knabin'per ŝuoj servos
vin;freŝigos la vangon la sesa in'.

La sepa el mia knabina ar'susure ludigas la citron;turniĝos de l' oka stekaĵ' sur
l' ardar',verŝiĝos bier' en kalikon.Aliaj en rond'en danc' kiel ond'vin lulos en nia
feliĉa mond'.

La naŭa plej loge vin distros per kant'pri inoj kaj viroj svatemaj;reĝine
kunpaŝos vi mem en la danc'en brilo de ŝtonoj gemaj.Neniu el niegalas al
vi,dancanta sur orponto en graci'!»

«Malmulte min logas la blua monteĵ'kun brilo glima en haloj;mi vidu la knabon
el hejma ej',kantiĝis tiel en valoj.Ho knab' mia, vi!Vin fidos ja mi!Por ĉiam kune
ekloĝu ni!»

«Ke vidu vi veron pri tiu knab',nur turni la kapon necesas.Kun ino li sub la
tegmenta trab'kaj hejmon kaj mondon forgesas.La ama sopir',nun nokta
delir'.Por mok' Montarino, ne plu por dezir'.»

Rigida ŝi staras en tag' kiel rok';la kor' ŝia velke fridiĝas;memore ŝi vidas en
senta ŝok';la mondo por ŝi glaciĝas.Kaj turnas ŝi sin.«Nun havu vi
min.Volonte fariĝu mi montarin'.»

Eksaltas la gnomo sur roka voj';li devas ja sorton laŭdi.«Sed nun vi forgesu
kaj vivu en ĝoj';min sekvu, kaj povos vi aŭdipri mia reĝej'de kamp' kaj
montej',pri olda Gumlo en sia ej'!»

Montaj troloj

Basa plafon'. Distas muroj.Prujno kaj blu-glacia glimo.Sombra hal'.Arĝento-
branĉoj en ŝtono brilas,kroĉa hok' kaj inversa runo.Aĉa blovo tra kvazaŭel
kel'.

Tablo larĝa sin vastigas. Hirtharuloj, nazegulinojsidas en rond'. Muĝo, hurlo, lup-ululo, grunto, grumblo, kruda krio en tiu trolejamond'.

Gratas kriĝas skabion, kruston; sango gutas; tondre ondasrida kriĝas. Ege drinkas aviduloj; mildetiĝas. Ogrin' kaj ogrotire frotas rostron al muzelo. Delic'.

Peze sur la hala plankopigre sin trenas gejunuloj, laŭvica ar'. Lante turnas sin ŝveba danco. Bastokordaj tonoj vibras. Svingas sin lace, oscede, plendeular'.

Obtuze profunde en obskuroogrin' ridaĉas, trol' seksardasen am-avid'. Aŭdiĝas hurlo, ŝaŭma siblego; kriĝas al krifo, dent' al gorĝo; malamikon senhaŭtigusajno.

«Fie mensogis vi, montulo!» krias Injeto: «Hide aspektas via gvardi!» — «Ege eraro!» tuj respondas la gnom' afable: «Tiuĵ, vidu, estas sklav-labora aromia!»

«Potenco tia, — ĉu ĝi sklavu?» — «Senpotencas malluma nesciodum tuta viv'. Jen vi nun mem aŭdu. Provu ni saĝon de troloj, basan, malluman, sen senco en ĝi.»

Alpaŝas li tiun plej aĝan: «Kial kamparano semas printempe semon? Nu?» «Hu?» — tiu re-demandas. Strabe, cerbume la trolo gapas. Ridaĉe pork-okule rigardas: «Hu?»

Alpaŝas li tiun plej junan: «Diru kial sopiras marenla river'?» Tiu malvole paŭte grimacas, spite li skuas longajn orelojn: «Fluu ĝi kie kaj kien ajnsur ter'.»

Alpaŝas li nun trolinon: «Kial infan' je malferm' de okuloj kriĉas?» Gapas la trolino: «Kriĉu ĝi.» Strabas malice al Injeto. Flaras, grimacas, akre per dentoj grinças.

«Tia la sklava parencaro. Mankas demandoj; respondoj nur estas tiaj de sklav'. Ni prefere profunden irukanton aŭskulti lamentadan, vortojn kolerajn de olda Gumlo, praav'.»

Gruntejo

[Saĝula Ej']

Profunde en la Skaro-enorm' kaviĝas halo el kupro; verdigre altiĝas la volba form' kun glimo de gutoj el supro. Bluetas glimo kvazaŭ en dorm'.

Gutadas fluet' kiel salivum' en tiu rok-hala sombro; lacertoj siblas, obtuza zum' oscede sonas en l' ombro. Serpent' meandras en sonĝa mallum'.

Angule en kaŝo en sombra krepusk'tra tempoj Gumlo sidas;Li sekan radikon similas en kusp',la membroj torditaj rigidas.Sur kapo kreskas likeno kaj musk'.

«Vi Gumlo, gardanto de l' tradici',»alkriĉas la Blua-mont-gnomo,«la Gumlo-kanton eldiru al ni;ĉiamu en mond' ĝia nomo.Rubaĵojn nur kantas junuloj ĉi.»

Jen kvazaŭ streĉiĝas horloĝa risort'ekgurdas la voĉa knaro,kaj grince eliĝas ĉiu vort'el olda Gumlo-kantaro,en serĉo de ĝia praa fort'.

Kanto de Gumlo

Kantas Gumlopri pra-erao.Regis gigantojla rondon mondan.Nokto timigakovris la teron.Mankis luno.Mankis steloj.Flamis nordlumosur glaciejo.Val' kaj kavoen kaŝo sonĝis.

Bone estissporte ludi,montojn fendi,fajron ŝuti,ŝtormon vekikaj maron kirli,glacion ŝovikun tondra bruo.

Bone ... bonelukte ĝoji,harojn tirikaj dorsojn rompi,kapojn skrapi,korne piki,krife ŝiri,orelojn tiri.Bone ... bonenur inert.En trankvilokruojn ŝparikaj neniuntaskon tuŝi.Satŝtopitadolĉe dormi.

Neniam zorgopro helaj vaporoj.Neniam sunoal okulo.Sen kreskaĵojla vastaj valoj;neniu fum'el hejma ej'.Tago dormismortodormon.Prujne blankistrolaj mondoj.Land' en kvieto,regno en pac'.Tempo staris.Ĉio mutis.

Ve! Ve!Pereas erao.Ve! Ve!Fi-epoko ...

Kreskis Alvo.Venis azoj.Sun' vekiĝis;tag' ekregis.Sinkis noktonebuleja.Venis al finogigant-erao.

Vintro ĉesis;printempo varmis.Glaci' degelis.Torentis akvoj.Ĝermoj kreskis;plantoj kreskis;arbar' densiĝisnebul-deklive.Kreskis viroj kaj virinoj.Fajro fumissur fulga ejo.Ŝtalo plugisduran grundon.Sin vastigisverdaj kampoj.

Sun' subiris,Sun' leviĝis;tago estrismondan rondon.Temp' ĝermigislongajn pensojn,fiksis celon,planon, solvon.Lukto! Lukto!Anim'! Anim'!Jen, junuloj,instiga vorto!Ĉio animaserĉas supren.Ĉio trolaŝirme sidu.

Jotuno gloraen mont' kaŝiĝis,rampis angulenmalfiera,En roka kavomalbenis tagon;de l' nokt' profitispor friponaĵo.Vente pelisprimaveron.Sendis neĝdunojn kaj maliculojn.Kovris vilaĝojnsub gruz' kaj sablo.Turnis ŝtonojn;ŝveligis glacion.

Baris, haltigisper mur' kaj mallumo.Nebulon kaj nubonal sun' li ĵetis.Eltiris radikojn.Kirlis maron.Vekis vintron,fimbulvintron.Sed sun' leviĝis,pelis nebulon,rompis glacieron.Neĝ' degelis.Herbo verdakovris grundon.Vivo ludislaŭ tuta land'.Rekreskis arbojkun milda ombro.

Degenerisparencaro.Krevis sub suno.Ekŝtoniĝispro di-martelokaj blanka kruco.Unuopulojposte sidasen roka ekzilo,malbenas tagon.Kelkaj cedemesangon fuŝmiksitis,malhonorisparencaronper hontaj nuptojkun homaj idoj,naskis kun elfoj.Gnomo nunla regnon estras.Senkuraĝala aro malkreskas,kurbe ŝteliras,eĉ humile.Malmulto restasel praa gento;neniiĝisgranit-gigantoj.

Aŭdu, idoj,vokon malaman!Brava jotun'helpo bezonas.Ĉu rilatiĝikun favaj vermoj,ĉarlatanojel fuŝaj ejoj,magiistoj,sorĉistinoj,plej fiaj plebojen la mondo,vagvostulojkun nigraj libroj,troloj ne,homoj ne.Hu! Hu!Ploro-tempoj!Hu! Hu!Ĉagreno-tempoj!Kaj el ĉiujplej alte estrasla Nub-Mensulosulfurolanda,lamul-diablokun huf' ĉevala,blagant' duone,duone pastro;lin kiel estronni devas laŭdi;estras ligiganto-regnon.

Ekstaru ĉiujkun juna sango,ek, kuraĝuloj,por jotun-regno!Neniu gigantotrankvile pigruĝis el la altafirmamentola ruĝan sunonni suben tiris,kaj ĉio silentosen ragnarok'!- - - - -

Flariĝas foje en sombra angul'kun stranga ĝem' kaj snufado;etendas brakojn ĉiu kriful';kun krio, grunt' kaj siblado:«Uhu! Odor' de kristana ul'!»

Krucigas ŝi brakojn per tuja far',Injeto; ĉe brust' rigidiĝas ...Ŝaŭme krakas kvazaŭ el mar',kaj ŝi al tag' revekiĝas.— Sola ŝi nun en deklivo Skar'.

LA GRANDA LUKTO

Aŭtuno

Nun surfe ruliĝas mar' al bord'kun ondokrestoj ŝaŭmantaj.Rompiĝas kreve ilia hord'ĉe troloj tie loĝantaj.Krias venteg' en sovaĝa liber'super abismoj sombraj;elfetoj ŝprucas sur rifo kaj ŝer'en tagoj aŭtunaj ombraj.

Mi aŭdas timiga demonkantad'de trolino tra surfon rajdanta.Ŝi estas per galdro kaj sia sorĉad'mizeron antaŭdiranta.Jen ĝeme, jen moke aŭguras ŝipri plago kaj pri sufero.Sorĉkante avertas la draŭga furi'pelante vivon de l' tero.

Pro ondaj battoj tremas la grund' kaj pala ĝi frostas nude. Fridiĝas korto kaj sin' ĝis fund'. La mond' dezertiĝas krude. Forflugis suden la lasta anser', barakte tra densan nubojn. Ĉiu vivanto pro vintro-sever' fosas por si kuŝejon.

Folioj rustiĝas en kaŝa boskejo kaj for de branĉoj tiriĝas. Moment' ĝis belecon perdas herbejoj plorinde mallonga fariĝas. Floroj feliĉis sub la sun', bele buntigis la korton. Eĉ ne unu restas nun; jam velkis ili en morton.

Formortas en juna sino sopiro, kaj velkas flor' kaj feliĉo je tiu estingo de arda deziro per salaj larmoj en riĉo. Formortas vivo, formortas espero, je kiuj mi reve avidis. Turniĝis la amo al ĉagrena mizer', ĉar min la knabo perfidis.

Nun regas ĉi tie trista frido, lacigas min loko kaj horo; Forprenis ĉion de mi la perfido; kaj brulas kaj sangas la koro. La maro ruliĝas forte al land', kaj la pluvo drivas kaj drivis. Susuras kanto laŭ nuda strand', ke nun do ĉio finiĝis.

Senkonsila

Ho bona vi knabo, ho bela vi knabo, lontane de vi mi eltenas ne. Logiĝas al vi, ĉiame al vi; kaj kien ajn ir' vekiĝas deziro; lesive brulas la larma ve'. Neniam mi feliĉiĝos.

Ĝentila vi knabo, ho, brava vi knabo, por vi mi donus ĉion for. Mi vivus por vi, mi mortus por vikaĵoj kiel edzino, oferus mi min por vin liberigi de ajna dolor'. — Ho vi, mi vin fidis elkore!

Jen mi en fido dum via alprem' forgesis aflikton, kaj pasis ĉagren'. Neniam plumi trovos vin, neniam plumi vidos nin, kaj brulas ploro en la brusto en trem'. — Ho ve, ke vi povis perfidi.

Nun kien la vivo? Al kiu la fido? Vojeton aŭ ponton ne trovas mi. Mizeras la sorto! Min logas la morto! Kaj kien la irado? Al tomb' la deziro! Vi estis la sola en vivo por mi! Neniam plu tago de ĝojo.

Ke mi forgesu!

Okazo plej eta min memorigas; ĝi hantas min, kaj ĝi min larmigas; je plej malgranda vorteto pri viko kora ploro tuj foriras mi.

Neniam plu mi ĉagrenon havis en forgeso mi min forsavis; ho, mi malsanus ne plu, se mi forgesi povus pri vi, pri vi.

Kiele?

Kiel fariĝis por mi, Injet'?Ne estas mi sama knabinet'!Petole mi kuris sur kamp', laŭ lag'.Ne estis longa por mi la tag'.

Aspekte sonĝo kaptis min;memor', mi ne plu komprenas vin.La sama mi estas en taga rond',sed tamen kiel en fremda mond'.

Mi ĉion tenas en klara vid'.Mi ĝojis, sed perfidiĝas fid';kaj ĉio samas sur ej', en hejm',alia tamen, tamen nur ŝajn'.

La dom' situas kie staris ĝi.Mastrumas Panjo kiel faris ŝi.Aridas hejm' kie mankas vort',patrin' fremdiĝas sub tia sort'.

Fremda marĉo! Fremda altej'!Fremde aspektas bovin' en paŝteĵ',alien turnas sin ĝia rigard',kaj min ĝi celas nur je hazard'.

Gapas fride la griza mur';regas trist' en angula obskur'.Rigidas mano, pied' kaj sin';pezige ĉio kontraŭas min.

Fenestre gapas mi en dezir',mi bird' en kaĝ', en sopir', sopir'.Neniun mi vidas sur kamp' aŭ lag'.Por Injo nun longa estas tag'.

Ho, hejmo mia, jen en sekur'mi vivis feliĉa en ŝirmo de l' mur'.— Ho Panjo! Estas ne plua ĝoj';L' animo ŝteliras laŭ fremda voj'.

Vintro-ŝtormo

Ke ege kraku en ŝira forto!Skuiĝu domo, kaj tremu korto!Rompu ĉion rompiga far',ke malakriĝu en pens' amar'.

Se prenus domon kaj kabanetonventego, donus ĝi forgeseton.Se l' tero cedus en sia grund', —forges' ekregus en kor-profund'.

Se el ĉiel' falus nub' vagante,se flusus mar' ĉion inundante,se l' tuta mondo mergiĝus for, —fariĝus paco en fina hor'.

En la kirko

En kirkon ŝtele kaŝiras mi;forresas pastron kaj vorton de Di'.— mi povra!Mi ŝarĝas pekon post pek' sur minpor ŝance povi ekvidi vin.

Je vid' de vi sangas mia kor'.Vi estis cel' mia por ador',— mi povra!Okuloj fajras kaj ardas vang',esper' vekiĝas en varma sang'.

Dezerto regas, sen vi en vid',kaj mortas sentoj en kora frid',— mi povra!Treniĝas hejmen mi en peza dub'.Vagadas pens' kiel nokta nub'.

Se ante sidas tiu in'kun larĝa dorso kaj pav-anim',— mi povra!mi maliciĝas en venĝa sopir'ĝis bruo vekas min por elir'.— Ho, savu nin el la peko!

Svatanto

Elrampas rokeja gnom' el sub tuf'kun kornoj sur kapo kaj kapra huf'.

Neniam vidis vi barbon tian;atingas ĝi magran kruron lian.

Neniam vidiĝis tia haŭt';sulkiĝas ĝi ĉirkaŭ gnoma paŭt'.

«Kuradis mi plenajn jarojn centojn.Neniam mi spertis pli varmajn ventojn.

O! vin mi ne vidis pli belajn inojn,sed tamen vi daŭre paŝtas ŝafinojn.

Vi estas en la dekoka jar', ankoraŭ virga sen svatanta ar'.

La mondo estus ja ŝanĝiĝinta,se vi ne estus edziniĝinta.

La mondo estus nur stulta afer',se vi ne riĉiĝus per or' kaj ter'.

Sed ne aŭskultu la Blu-mont-ulon,tian senkornan flavbekulon.

Aŭskultu ne al la Blu-mont-ul',senpantalona malriĉul'.

Ne fidu lin, li nur flate blagis;patrino lia almoze vagis.

Laŭ via volo mi estos viropor kontentigi vin laŭ deziro.

El tuk' kovranta vian koroneltiros mi vian am-doloron.

El ĝi mi tiros vian malamon;ŝi ĝin ricevos manĝe kiel salon.

Ŝi morgaŭ kuŝos kun vea kri';post du semajnoj silentos ŝi.»

Injet' malligas leĝeran tukon;sed haltas tuj; ĉar ŝi sentas kulpon.

Ĉu fari? Voli? — Ŝi maliciĝas.Detiras tukon; ĝi al gnom' doniĝas.

«He — he!» la gnomo en ĝojo mekas;«sed pagon havu mi,» tuj li blekas.

«Kiam tomben ŝi portiĝos,Al mi Injeto fianĉiniĝos.

Neniam sentu vi plu doloron.Sur vin pendigos mi brilan oron.

Mi ne fanfaronas en nura vent'.Bovinojn mi havas ĝis dek du cent.

Porkojn je nombro de ŝtonoj en sablomi havas, kaj ŝafojn trans nombra kapablo.

Grundon mi havas ĝis mont' sub la stelo.Riĉa mi estas, kaj lustras el belo.
Kornojn mi havas, bravulan signon.Postaĵe la vost' donas kroman dignon.
Por vi plej bona fianĉ-omaĝode riĉa vir' en la ĝusta aĝo.»
«Ne volas mi! Ne mortu ŝi!»eliĝas el Injo pentema kri'.
«Foriru! Redonu al mi la tukon!»Ŝi preĝe faras per brakoj krucon.
For estas tuj la saltanta gnom';la tuk' postrestas ĉe griza ŝton'.
Sur tufa roko kuŝas tuketo;pro penso malica tremas Injeto.

Maltrankvilo

Mi kiel fartos, Dion forgesanta,kun kor' en ama pasi' revanta?Mi kiel fartos laŭ
certa sci'?Min mem ja forperdigis mi.
Neniam mi min relevi povos.Neniam plu mi min mem retrovos.Bariĝis vojo kaj
eĉ esper'. —Per vi mi savus min el sufer'.

Preĝo

Ĉiela reĝ', ho helpu min!Mi luktas en doloro.En senespero tordas sinla
laciĝinta koro.Malbono havas tro da fort';por ĝin esprimi mankas vort'.Mi
brulas en angoro.
Ĉiela reĝ', ho helpu min!Aŭskultu petan vorton.Vi luktis mem ĝis venka
fin'spitante fian forton.Teruras lukto en mizer'!Vi estu ĉe mi en sufer'.Vi povas
ŝanĝi sorton.

Erarvoje

Tempoj pasas en lanta flu'.Vadas la viv' en mizer'.Dion bezonas anim' post
sku',post perdo de bona esper'!
Vintro kuŝas sur frida mond'.Ĉu iam mildiĝos ĝi?Helpu animon sur ŝtorma
ond'perdinta fidon je Di'!
Laciĝas en pezaj penoj Injet';perdiĝas kuraĝ' kaj fervor'.Erare ŝi iras laŭ voj'
kaj vojet',trolejen ŝin pelas dolor'.
Nokte trolejon trovas ŝi.Jen fine decida moment'.«Aŭdu! Min nun enskribu
vi,por trinkaĵ' de amora tent'!

Donu trinkaĵon, ke turnu li sinal mi, sia ĝusta am'.Almenaŭ nokton posedu mi linkaj poste perdiĝu en flam'.»

Ridete pendigas la aĉa virin'kaldronon dum eksorĉad':«He-he! tiel oftas, ke tia la fin',sed fidu je mia traktad'.»

Ŝi verŝas el korno kaj miksas el glas',murmure zumante kantojn.En akvo elnorda ŝi kirlas en vaz'radikojn kaj toksajn plantojn.

Kaldrone bolas kun knar' kaj ĝem',sorĉade kantas ŝi:«Nun bolas larmoj, nun bolas trem',nun bolas kora pasi'.

Bolas ardanta, varma sang',bolas sopira ĉagren',bolas pere de galdra lang',bolas kun pulv' kaj venen'.»

El brust' de Injeto tri gutojn da sang'ŝi tiras kaj faras trinkaĵon.El aĵo de l' kata subventra flank'gutigas ŝi elfluaĵon.

«Perfidon, damaĝon forŝorĉas mi.Mi sorĉas per ĉiuj potencoj.En sango kaj osto — trioble tri —silentu la falsaj sentoj!

Mi galdras pri Jon en Skarebrot,per galdra brogaĵet'.Je trink' turniĝu la am-dorlot'al lia ino, Injet'.»

Kraĉas ŝi ŝaŭmon al la kaldron',ŝvebas flava sulfur'.Ŝprucas haladza vapor' al plafon',krakas la doma mur'.

«Trioble tri, en nom' de Satan',estro de l' profundejo.Satano! Satano! — Huj la ekflam'!— Atendas vin abismejo.» —

El flamoj manon la sorĉistin'levas en tomba silent'.Venkas Injeton penta tim'kaj svena, vertiĝa sent'.

Ŝancele dancas plank' kaj fajrej',ĉio strange moviĝas.Ŝi kuras sur ŝtona, tufa altej'kiam ŝi rekonsciiĝas.

Ŝi vekigigas

Injet' silentis en malfort'.Diriĝis iu eta vort'en flustra klar': Patrino.Intenco kia! Ĉu kaŝi sin?Ŝi hontos antaŭ la patrin'.Ne taŭgas ke ŝi plendas.Abisma fin' atendas.

Doloras kor' pro pek' kaj hont'.Ekstaras el mistera font'estaĵo neĝe hela.Pendas riĉe la mantel'.Injeto petas en ŝancel'al la fratin' fidelapor help' en sort' kruela.

«Beata, kara, vi fratin'!Min helpu! Morto prenos min.Al inferul' mi jesis.Laŭ fipotenco de Satan'li kaptis min per sia man'.Min gardi mi forgesis,per ĵur' al li promesis.»

«Vin turnu al kreant' de l' sun'.Ne tute vi perdiĝis nun,fratinjo, en hororo.Retiru vin per forta kor'!Trinkaĵon pekan ĵetu for!Toleru en doloro!— Kreiĝis vi al gloro.»

Forŝvebas kanto kaj vizi';denove sola staras ŝien la inico sia.Batalas ŝi ĝis venka fin'.Rekuraĝiĝas la anim'per ŝia preĝo pia.Ŝin savas «Patro Nia».

Returnas ŝi en laca kur',retrovas ejon de l' terur',ektiras la pordaĉon.«Ne volas helpon mi de vi!Mi turnas min de vojo ĉi!»Ŝi ĵetas botelaĉonen flaman ardantaĵon.

Peza momento

La longa vintro finiĝas,kantante je sia forir'.Deklivoj blankaj bruniĝas;ŝvele fluas river'.Anstataŭas radoj glitilojnsur vojo, vojeto kaj pad'.Drivduŝas pluv' la altejojn kaj domojn per frida gutad'.

Jen ene en la ĉambretosur alta kaj mola lit'delira en sia dormetokuŝas malsana Injet'.Ŝi dormas je tristaj tonojtra fendoj en trunka mur'.Parolas multaj sonojen venta, elmara susur'.

En dorm' ŝi lamente sopiras,ke kantu la vent' pri la sort'.Pri tiu ton' ŝi deziras,ke estu ĝi tono de mort'.La knab' plenumonta la verkonedziĝi kun in' en perfid'renkontu la nigran ĉerkonkun Injo en frida rigid'.

Sed dorme juneco fortiĝaskiel nokte ŝvela burĝon'.Injeto sin ellitigas.Li rajdas al kirka dom'.Ĉe verda fenestro ŝi sidas,turniĝas rigard' al nord'.La nuptaron la sun' eklumigas,kaj gajigas ludista kord'.

Al lit' ŝi returniĝas;ekkaptis ŝin malfort'.La vangoj de larmoj bruliĝas,sed palaj kvazaŭ pro mort'.Tordiĝas ŝi noktojn kaj tagojnen senripoza sku',kaj falas en lamentadojnke devas ŝi vivi plu.

Kun hajlo kaj splitoj glaciajkaj morda, frostiga pov'la vento-tagoj vintrajturmentas per ŝira blov'.Malbonas temp' pro drastajŝanĝiĝoj de la veter'.Estas la luktoj lastajĝis venkos primaver'.

En «Blua-Monto»

Pluva pendas l' aero. De branĉoj kaj vergoj gutadas. Nigra, humida elmara nebul'ĉion aspergadassub volviĝanta nuba rul'.

Kaj al la okul' distingeblas nek kampo nek korto nek turo. Kvazaŭ glutita de akva inund'kaŝiĝas la land' en obskuro. Aspektas la ejo mara profund'.

En erikejoj malhelaj kolektas Injeto la ŝafojn. Tondro de l' maro vokas en ŝipense pezigajn imagojn. Ekglitas ŝi trete sur glaci'.

Sorĉiĝas ŝi en nebulon, plurfoje ŝi devojiĝas. Vokas ŝin kri' kaj vaganta susur', sorĉaĵoj en vivon vekigigas; aŭdiĝas mistera rivera murmur'.

Supren el profundejoj leviĝas ŝvebantoj ombraj. La nikso sur sia duona ĉeval' kaj troloj vilharaj sennombraj sin ŝovas antaŭen amase el val'.

El mont' kaj rokaj kavoj rajdas vicoj elsonĝaj antaŭen super profunda marĉeg' kaj laŭ la vojoj longaj kun tinta bruo kaj muĝa krieg'.

Dum tie ŝi vagas en revoj, de vunda memor' ŝi ŝiriĝas, en elf-danc-ringo troviĝas ŝi, kaj tie ŝi ensorĉiĝas kun mur' de nebulo ĉirkaŭ si.

*

Injeto en mir', pro sorĉa fort', staras meze en reĝa kort'.

De domoj kvarflanke ŝirmita mond'kuŝas kviete sub luna rond'.

Ĉirkaŭ la mola korta herbar' staras portiko sur arka ar'.

Portas kolonoj el pura arĝent' orajn frontonojn sub doma tegment'.

Arkoj kunligas kolonojn sub tur'; drak' kaj serpento meandras sur mur'.

Alte lumas la reĝa kastel'. Flamas el kupro tegment' al ĉiel'.

Glimaj turoj etendas sinkun oraj kokoj sur pinta fin'.

Sorĉita ŝi vidas ke paron post par' elvenas la kortegana ar'.

Arĝento kaj oro kaj blanka lin' orname radias de ĉiu knabin'.

Sonoriletoj per tinta sonoro emociigas Injeton al ploro.

Eksekvas saltodanco sen brid'. Tiriĝas Injet' inter plor' kaj rid'.

Kaj fine jen melodi' tiel bela, ke sentas ŝi sin en feliĉo ĉiela.

Dancas knabinoj kantante al Injo: «Ĉi tie vi vivos ĉiam en ĝojo.

Jen vidu la reĝon! Se nun vi restos,kronon el oro kaj floroj vi portos.»
Jen vidas ŝi sub la arkaĵa or'reĝon staranta en brila kolor'.
Purpura vestaĵ' kiel ruĝa sango,krono el oro laŭ reĝa rango.
Reĝa vergo kun flava flam'lumas en lia dekstra man'.
Gloro li estas. Ŝi volas cedi!Ŝi volas tian dignon posedi!
La danco viglas en svingo kaj tord'.Logas per lud' violona kord'.
En ravo kaj ĝojo ŝi «Jes» por respond'donas al bela knabina rond'.
Jen la knabinoj en blanka lin'etendas kruĉon plenan de vin'.
«Trinku, gajnu feliĉon reĝinan!Trinku, forgesu aflikton vian!
Trinku el la kruĉo, kaj trinku ĝis fund'.Tuj forgesiĝas la kora vund'.
Ne pripensu! Eniru la ĝojon!Feliĉon ofertas ni lastan fojon.»

*

Al Injo paliĝas la bruna vang',fridiĝas en ŝi la kora sang'.
Injeto sur brunaj vangoj paliĝas.Revenas memoro; pensoj vekiĝas.
«Ĉu mi forgesos aflikton de kor'?»— «Ĉiujn afliktojn pelos ni for.»
«Ĉu vi estingos la fajron en sin'?»— «Trinku, kaj poste ne sentos vi ĝin.»
«Ĉu vi estingos afliktan flamon?— Por nenio perdu mi mian amon.
Prefere al perdi aflikton amaranmi iru almoze inter la homaron.
Prefere al forgesi korbrulajn plagojnmi iru mokata inter la vilaĝojn.
Prefere al forgesi la trovitan knabonsola mi faru mian vagadon.
Neniu alia min premu al sin'.En nom' de Jesu' liberigas mi min.»
Ĉio malaperas: reĝo, domoj, fostoj,kaj en la nebuleto forfuĝantaj vosto.

Libera

Dum nokta pac' ĉe lita fin'en longa nigra vest' virin'sin montras al Injeto.La
franjo staras apud ŝi,hele bela la vizi'kun sankta ĝoj-rideto.Ŝi kantas en kvieto:

«Vi fratinet' de mia kor',nun servos vi al la Sinjor'.Jen sankte sonoriĝas.Vi tiris vin el trola prem';kaj trovis en dolor' vin mem.Vi supren nun leviĝas.Alteco atingiĝas.

Nun venu akompani nin;la nova voj' kondukos vinal lumo, kaj tagiĝos!Kruta, longa vojo ĝi;Injet', ne timu tamen vi,eĉ kiam vi laciĝos.La sort' por vi ordigos.

Jen staras muzo de l' saĝec'.Vidigos ŝi tra malklarec',kaj vi per ŝi proviĝos.Ŝi gvidos vin eĉ tra infer'.La leĝon de la viv' sur ter'vi tra teruro vidos;honor' por vi fariĝos.»

VORTOJ

montarino

— Ino kiu vagas kaj vivas inter montoj kaj kies animstato influigis de tio; moknomo ĉi tie.

menianto

— Floro tre ŝatata de bestoj. (*Menyanthes trifoliata*)

ardeo

— Birdo kun loka nomo Gråhegre. (*Ardea cinerea*)

pluvio

— Birdo kun loka nomo Heilo. (*Pluvialis apricaria*)

kanto

— ¹⁾ Kanto kun muzika melodio. ²⁾ Deklamado, ekzemple la Edda-kantoj, kaj ĉi tie «[La Kanto de Gumlo](#)».

draŭgo

— Martrolo aŭ reaperanto.

Mons

— Nomo de virkato.

Lars / Per

— Virnomoj.

Manjo

— Virina nomo.

Holand / Vatn

— Nomoj de bienoj.

huldro

— Ege bela subterulino, kiu paŝtas la brutaron samloke kie la homoj, sed nevidata krom hazarde foje. Ŝi havas voston.

saltodanco

— La norvega danco «Springar», nesimetria triritma.

Haukeli

— Montara regiono inter orienta kaj okcidenta Norvegio.

skaras

— Onomatopeo; la sono kiun eligas la pigo.

erikserpento

— Mitologia serpento kiu kreskis al drako kaj kuŝis ĉirkaŭ la domo de princino.

Skarekula

— Monto kie Satano kaj gesorĉistoj kunvenas. (Blokksberg)

Haŭgastad

— Hejmbieno de Injeto.

Amund / Jon

— Virnomoj.

Brot

— La bieno de kie venas Jon. «Brot» = novkultivejo.

Skarebrot

— «Skar» = fendo.

Dokka

— Ofta bovina nomo kun signifo «Pupo».

vaglumo

— Lampiro, lumvermo.

galdro

— Sorĉado; vorto el la norena mitologio.

Hel

— Norena nomo de Infero. Ankaŭ nomo de la norena estrino de tiu loko.

Majstro

— La Kreanto

Gro

— Virina nomo.

Knut

— Virnomo.

Jotuno

— Giganto.

fimbulvintro

— Ege severa vintro. Unue prirakontata en «Voluspá»

di-martelo

— La martelo de la Tondro-dio Tor. Ĵetinte ĝin li ĉiam trafis giganton mortige, kaj la martelo reen flugis en lian manon.

blanka kruco

— Kristanismo oficiale decidiĝis en Norvegio en la jaro 995 de la reĝo Olav Trygvason.

Ragnarok

— Fino de la mondo. Fina lukto inter la dioj kaj la gigantoj, aŭ inter kulturo kaj primitiveco, aŭ inter Bono kaj Malbono, aŭ inter Dio kaj Satano. Priskribita en la Edda-kanto «Voluspá».

meandras

— Serpentumas. En la helena arkitekturo serio de kurbiĝoj en ornama linio laŭ la randoj ekzemple de frontonoj. En norvega mezepoka arkitekturo tio reprezentiĝas per drako kiu meandre beligas ekzemple ambaŭflanke portalojn de fosto-preĝejoj.

KLARIGOJ

Prologo

La prologo fakte estis verkita post la plenumiĝo de la tuta poemaro. La poeto dediĉas sian verkon al la pejzaĝo de Jären, la vasta apudmara plataĵo en sudokcidenta Norvegio sude de la urbo Stavanger. Agrikultura regiono kaj bestobredado. Ŝafoj paŝtiĝas en la deklivoj de la malaltaj montoj iom interne en la regiono. Tiu pejzaĝo donis la poezian kadron al la poemaro.

Arne Garborg naskiĝis en la parenca bieno «Garborg» en la komunumo Time en Jären. Lia patro bone kultivis siajn kampojn kaj ankaŭ funkciis kiel instruisto. Li estis tre religiema, kaj opiniis ke la antikva, israela kristanismo, kiel ĝi prezentiĝas en la Malnova Testamento, do iu laŭlitera religio, estas la ĝusta kristanismo. Li estris sian hejman vivon kiel antikva israela tribestro kaj pastro. Fine li fariĝis tiel mense obsedata, ke li perdis liberan memregon kaj mortigis sin per pendiĝo. La instiga okazaĵo por tiu ago estis, ke Arne, la plej aĝa filo, rifuzis akcepti la bienon alode post la patro, kaj tiel daŭrigi la parencon, heredan linion sur la bieno. Arne volis fariĝi verkisto. Sekvo de tio estis, ke Arne sian tutan vivon havis malbonan konsciencon pro la sorto de sia patro.

«al vi mi kantas pri la viv' / en sombra mond'.»

— estas ĝuste la pensoj kiuj torturis Arne ĝis li liberiĝis per verkado.

«La lukton pezan konas mi».

— La anima lukto kiu fine instigis la verkiston verki.

«rompitaj ostoj»

— Fizika bildo pri tio kio okazas en la animo.

«Mi konas vin»

— «vin» estas la patro.

«boat', torent'»

— Fizika bildo pri la fatala fino.

«alaŭd' ekŝvebas»

— Fakta bildo pri io, kio okazis kiam la verkisto post multaj jaroj vizitis la tombejon de sia patro. Vidu la poemon «[Printempa tag'](#)».

Injeto ĉe la ŝpinilo

La feliĉa komenco de la vivo de Injeto. Bildo de la hejma vivo en tiu kamparo. Medio kaj etoso antaŭ la tempo de industria revolucio kaj antaŭ la rapida kresko de urboj. «Aŭtunas. Veteraĉo» kaj «Ho-hu! La veteraĉo / kun pluv' kaj venta frid'» donas al la leganto impreson kia estas la klimato en kiu Injeto devas vivi kaj paŝti. Komparu kun [Ne estas facile](#) kaj [Malbona tago](#). La diversaj statoj de sano kaj animo en Injeto speguliĝas paralele en la statoj de la naturo.

Injeto estas en sia dekoka jaro kaj ankoraŭ ne spertis gravan malbonon aŭ seniluziiĝon. Ŝi havas viglan fantazion kaj facile inventas kaj rakontas fablojn, kiel en ĉi tiu poemo. La leganto notas, ke estas ama fablo kiun ŝi prezentas.

Dum siaj infanaj jaroj la verkisto ofte aŭskultis al folkloraj rakontoj, precipe de rakontkapabla junulino, kiu servis en tiu bieno. En sia matura aĝo li prilaboris tiun materialon por sia propra celo. La popolaj kredoj kaj vizioj estis konsiderataj veraj, kaj estas necesa fundamento por la ideoj de la poeto.

Vesperiĝo

Injeto faras sian ĉiutagan laboron en la bovinejo en akordo kun la gnomo de la bieno. Laŭ folkloro ĉiuj bienoj havas sian gnomon, kiu gardas precipe la bovinejon.

«kun la kat' dancadas»

— Unu el la ŝercemaj versoj en tiu ĉi serioza poemaro. Ĝi spegulas la rilaton inter la homoj kaj la bonvolemaj gnomoj (Norveg-lingve: «Nisse» aŭ «tuftekall») La bona gnomo estis malalta kaj havis ruĝan trikitan ĉapon.

Rimarku la oftan ŝanĝon de metrika sistemo inter la opaj poemoj.

Ĉe la fajrejo

En la kamparo estis kutimo vespere kolektiĝi en la hejmo de iu kiu lerte povis rakonti, kaj tiu estas Injeto. Ŝi havas nekutiman kapablon rakonti kaj memori kaj

vidi plion ol aliuloj. La vilaĝanoj ankoraŭ ne komprenis la supernaturan vizian vidkapablon de Injeto. Estis por la aŭskultantoj nur fabloj, kion ŝi rakontis, tamen realaj. La vizia kapablo rivelas sin en «[La vidaĵo](#)».

«nupton festos vi»

— La huldroy provis logi al si virojn. Tiel ili havigis al si eternan vivon, kion subteruloj ne havas.

Vidu la antaŭlastan strofon: «povintus savi vi ambaŭ nin».

«tranĉilon»

— Kiel la biblio, nomoj de sanktuloj, la signo de la kruco ankaŭ nuda ŝtalo rompus la sorĉon.

La pasero

«Veslemey» (prononco: —mej)

— Norveglingva karesnomo de Injeto kiu vere baptiĝis «Gislaŭg». Je Julio estas kutimo meti garbon sur stango ĉe la ponto de la fojnejo kiel Jul-donaĉon al la birdoj.

Kantiĝas

La subteruloj provas tenti Injeton per ĉiaspecaj valoraĵoj kaj brilaĵoj. Ŝi estas en la sama situacio kiel Jesuo sur la monto. (Mateo IV). Arĝenta ŝpinilo estas en folkloro kutima donaco por logi inojn.

«tago»

— la mondo de la homoj kie la suno lumas. La subteruloj ne toleras la sunlumon. Al ili donas lumon oro kaj arĝento kaj aliaj glimaj valoraĵoj el la rokoj. Por logi Injeton la subterulo devas favore priskribi la subteran vivon.

La stato de la vetero korespondas al la anima stato de Injeto. Tiel la verkisto donas paralelan evoluon inter ekstera realeco kaj tranca animstato, kaj tiu lasta atingas spiritan realecon.

Antaŭsciigo

Injeto vidas la reaperantan fratinon Lizabet', kiu estas kvazaŭ ŝia gard-anĝelo. Ŝi inicas Injeton al supera servo post kiam ŝi trinkis la enhavon de la kaliko. Tiu trinkaĵo reprezentas la dolorigajn spertojn, kiujn ŝi trapasos dum ĉi tiuj 70

poemoj. La Kreanto metas ŝin antaŭ vico de provoj por vidi ĉu ŝi estas matura por eniri en lian servon, ĉar li bezonas ŝian kapablon. En tia servo nur akceptiĝas la plej kapablaj kaj tute puraj homoj.

Mateo 26 ³⁹: Jesuo: «Ho mia Patro, se povas esti, ĉi tiu kaliko pasu for de mi; tamen ne kiel mi volas, sed kiel Vi volas.»:

Jesuo sciis kio okazus pri si kaj akceptis la sorton kun malfermaj okuloj. Injeto estis sensperta kaj timis nenion. Ŝi ne antaŭvidis ion malbonan, ĉar vidiĝis ankoraŭ neniuj kaŭzoj. Ŝi vivas en kompleta nescio. Tial ŝi ne petas esti liberigata de iuj postuloj ligitaj al la kaliko.

Injeto travidas ĉiujn falsaĵojn. Gravas dungi en la batalo kontraŭ malbono la plej dotitajn karakterojn. Tamen ne nur taŭgas rifuzi kaj venki la malbonon ekster si. La malicajn sentojn en la persono mem devas ankaŭ esti elradikataj, tiel ke la homo povas ekstari tute pura antaŭ la homaro por kiu ĝi estu gvidanto.

Imagu la tragedion sentatan de juna homo kiu antaŭvidas tian sorton, kiel faras Injeto en la poemo «[La Montarino](#)». Tiu estas la momento kiam Injeto, kiel Jesuo, estus petanta pri liberigo de la kaliko. Malaperas por Injeto la ebleco vivi la ĝojan vivon de juna kaj gaja knabino sen bezono okupiĝi pri homaro kaj peko kaj maldeco kaj perfido kaj venko. Plej feliĉa estas tiu, kiu nenion vidas kaj tial ne kulpas pro respondeco.

«kaptiloj»

— tentoj de la malbonuloj. Injeto estas danĝero al la malbonuloj.

Rimarku kiel la verkisto utiligas la naturon por ŝanĝi inter supernatureco kaj realeco. Li mole glitas el la sonĝo, for de la vidaĵo, pere de matena glimo kaj fine pere de fru-matena vento. Kiom el tio estas reala? Kio estas la vera realeco?

Dimanĉ-trankvilo

Jen bildo de la feliĉa juneco antaŭ ol la enhavo de la kaliko komencas havi efikon. Nenio stranga ĝis nun ligiĝas al Injeto. La junuloj senkulpe fritas tranĉaĵojn el terpomoj kaj dume babiladas kaj ŝerce provokas unu la alian diveni enigmojn. La enigmoj estas malnova folkloro; kelkaj el ili troviĝas en la Eddakantoj.

Panjo atendas

La patrino scias pri la vizia kapablo de Injeto. La medio ĉirkaŭ ili do havas multe pli da estaĵoj ol tiujn, kiujn ordinaraj okuloj vidas. Tio kreskigas la zorgan timon de la patrino, ĉar Injeto ofte estas sola ekstere en mallumo pro atento pri la brutoj. Kredo pri antaŭfantomoj estas kutima en folkloro, kaj la verkisto konscie utiligas ĝin por sia arta verko: (norveglingve: fylgje, vardøger).

Injeto

Jen Injeto, sur kies junaj ŝultroj estas metita la peza ŝarĝo esti tiu, kiu sola vidu la kaŝitajn verojn, kaj tiu ĉi estas la unua momento kiam ŝi konscias pri la graveco de la tasko metita sur ŝin de la Kreanto. Li bezonas puran animon por sia servo.

Ne strange ke ŝi eksidas en silento. Tiu ĉi estas la momento kiam ŝi komprenas kia estos ŝia sorto. Ŝi do vidas la malsamecon inter si kaj aliuloj. Kiel ŝi de nun rilatiĝu al siaj geamikoj?

La vidaĵo

Jen la unua fojo kiam Injeto rigardas tra la fendo enen en la mondon de la mortintoj. Ŝi ne teruriĝas pro la vidaĵo mem, sed pro tio ke ŝi de nun estos hantata de ĉiaspecaj vidaĵoj, kaj ŝi komprenu kaj spertu ĉiajn fiaĵojn en la mondo.

La montarino

Pruviĝis ke estas vero kion Injeto vidis, kaj ŝi komprenas nun kia estos ŝia sorto inter la vilaĝanoj, kio signifas esti la pioniro inter la homaro, kaj tia sorto ne estas agrabla. Ankaŭ la patrino komprenas ke ŝi havos bedaŭrindan sorton, sed Injeto subigas sin al la tasko donita pere de la kaliko, kiun ŝi devis malplenigi. Fieraj sonas ŝiaj vortoj:

«Sed klare vidipreferas miol iri blindatra l' mondo ĉisen eblo veron distingi!»

Junuloj

Jen prezentiĝas scenoj kaj scenejo de tio kion Injeto devas vidi, kaj kion Arne Garborg estis vidinta. El tio ĉi li evoluigas la universalan vizion.

Festeno

Detaloj el tiu ĉi longa kaj komplika poemo troviĝas en folkloro historio, kiun la verkisto utiligas por sia celo priskribi la staton en la siatempa socio, nome pri konduto kaj moralo kaj sociaj rilatoj.

«Eksidis Injet' en malluma angul'»

— Neniu volas aŭ kuraĝas danci kun ŝi ĉar «Diriĝis: Mankas prudento». Ŝi sidas kaj devas vidi la fantomojn sekvantaj al ĉiu ajn el la festenanoj, kaj tiel riveliĝas al ŝi la karaktero de ĉiu opulo kaj sekve la karaktero de la festeno. El tio ni suspektas la socialan sintenon de Arne Garborg.

Tamen kreiĝas io nova inter la homoj, nome mensaj statoj sendependaj inter ili. Tiuj abstraktaj statoj kreitaj de sentoj fariĝas el si mem aktivaj kaj agantaj fortoj, kiuj kaŭzas novajn kaj neatenditajn reagojn. Ĉio estas prezentata pere de transnaturaj aĉaĵoj: «Jen nova bruad', alsturma kurad', ensaltas amaso en miriad'!» La abstraktaĵoj inter la homoj, do sentoj, malamo, atakemo, perfido, fuĝo, envio kaj tiel plu fariĝas en si mem instigaj kaŭzoj de agoj; kaj tiel en la poemo ili reprezentiĝas kiel estaĵoj, tute kiel sur scenejo. Injeto estas la sola, kiu vidas tion kio estas en kaj inter la homoj.

«Nun suben kaj norden drivas la hord',»

— al neniigo — al Infero aŭ al glacia trola mondo. Esprimo el la antikva lingvo. Iu iom pesimisma vivaspekto. La lukto kontraŭ malbono ne havos finon. Optimisma kontraŭo troviĝas en la poemo «[Neĝego](#)».

Estas du gravaj kialoj por la subteruloj logi al si Injeton. Ŝi estas la sola kiu povas travidi ilin kaj ilin senvualigi. Due estas dirende ke pro ŝiaj kapabloj gravas gajni ŝin kiel kunbatalanton en la lukto inter la bono kaj la malbono en la mondo. La malbonaj fortoj logas al si talentulojn. Tamen se temas pri moralo, novuloj devas esti cerbolavataj por ke ili tute akceptu la vivkoncepton de la subteruloj, kaj ke ili tute forgesu la homan vivon kaj moralon. Rimarku la molan transiron ĉi tie al nova temo kaj nova metriko:

... Dolĉe kiel plor'sonas harp-sonor';logas ama sent'kvazaŭ milda vent';flata la lul',kiel onda rul'dormiĝas ĝi en sonĝ-trankvilo;vekiĝas el silent',ŝvelas en potenc',kiel ŝaŭm-susur'en la mar-murmur';el la dorma ĉarm'ŝvebas tona svarm'amovarma, dolĉa trilo ...

EN LA PAŜTEJO

La verkisto metas Injeton en naturan medion. Tiel li sukcesas priskribi sian propran hejman regionon kun klimato kaj birdoj kaj aliaj bestoj. Jen la ekstera

kadro de la tuta poemaro. Estante simboloj la spiritaĵoj do celas kaj aludas al reala homa vivo.

La vento-troloj

Tute realisma, sed samtempe poezia priskribo de la ventoj en tiu regiono. La fina strofo ligas tiun poemon intime al la anime intensa evoluo de Injeto.

Ne estas facile

Realeca priskribo de paŝtista vivo en tiu regiono. Samtempe la interligo kun la subteruloj fariĝas pli videbla, kaj la subteruloj fariĝas pli kaj pli realaj estaĵoj.

Birdoj

Ĉarma kaj petolema priskribo de la birdoj en la ĉirkaŭaĵo de la bienoj en Jären. Estas la verkisto mem kiu ekstaras en la poemo. La kompato kun aliaj estaĵoj kaj malbona konscienco pro malbona konduto ligas la sentojn de la verkisto al la ideo kaj temo de la poemaro. Postuliĝas pura animo:

Ovojn belajn mi trovis en nesto. Sekve rabiĝis ĝi. Birda patrino dolore pepis;—neniam plu faros mi.

Pluvio, la bela bruna birdo, velurflugila trezor'; kiam ŝi fajfas en erikejo, varmiĝas en mia kor'.

Je somermezo

Estas bona ekzemplo ĉi tie kiel vizio grade malkaŝas sin al Injeto:

jen trikaĵon ŝi forgesas pro impreso de la sensoj kaj en senpripensaj pensoj glitas for, vizie revas: vidas ke herbej' viviĝas, ke vekiĝas ĉe ŝtonarokaj rekreskas la herbarokie jen brutar' paŝtiĝas. Montulin' en blua jupo, sur la brust' arĝent-folioj, sidas sur tufo sub deklivo. Ŝutas ŝi salon al bovinoj.

kaj tiel interplektiĝas la vivo de la huldoro kaj tiu de Injeto.

La subteruloj ne toleras sunlumon:

Kiam ŝveba nebulej' malheligas teron, ni vagante laŭ altej' ĝuas la liberon. Dum nebulo sur dekliv', — sendanĝera huldra viv'.

La herbsezono

Plia realisma bildo de vivo kaj laboro en la kamparo. Regas feliĉo, sed el tiu Injeto tiriĝos por supera servo.

Injeto miras

La malsameco inter Injeto kaj la aliaj gejunuloj estas substrekata de la eldiroj de Injeto. Tamen la verkisto ruze finas la poemon per:

Ridi kaj ŝerci supraĵe, — jen mi; sed kisi barbulon? Ho fore de ĝi! — — Sed tamen, — se l' sorto regus?

Kondamnita

Prezentiĝas la ne nur mezepoka kredo pri peko kaj eterna puno. Sed eterneco estas ligita al la stato de la animo. Do ne ekzistas «tempo». Ne temas pri la tempodaŭro de la puno. Gravas la anima stato en kiun la pekulo metis sin. La peko kvazaŭ materialigas kiam ĝi fariĝas vibranta bildo en la konscio de homo kaj tiel sekve influas ĝian konsciencon.

Translokigi partigan ŝtonon inter la bienoj estis grava peko laŭ la antikvaj leĝoj.

La lunluminoj

Foje kaj foje la subteruloj provas logi Injeton, kaj tion ŝi prezentas. Nek al Injeto, nek al la leganto estas facile distingi inter realeco kaj sonĝo:

Injo staras kvazaŭ en tranc', rigardas sonĝe al tiu danc'. Kapklinas ili salute, kaj dissolviĝas en bruma trans'.

Profanado

Laŭ popola kredo osto de mortinto povus sanigi aŭ forigi malsanon. En la sekvantaj poemoj okazas la kontraŭo.

La postulanto

«draŭga fato»

— esti reaperanto kiu ne trovas ripozon en la tombo. Fizikaj reaperantoj estas necesaj en literatura verko. Tamen ili reprezentas ion kio devas esti ordigata aŭ kio estas kontraŭa al la rilato inter fortoj kaj sintenoj aperantaj inter homoj. La pastroj, kiuj estis aŭtoritatuloj, ja kredis pri reaperantoj; kial do ne ordinaruloj?

En la nebulo

La provo redoni la ŝtelitan oston malsukcesas por Injeto. Kaj tion ŝi ŝuldas al hazarda forgeso. La gnomo sentas kaj kondutas kiel homo.

Injeto malsana

Sekvo de la peko, sed ankaŭ severa provo por ŝi. Ĉio okazanta estas iel ligita al kaŭzoj. La korpa malsano sekvas al spirita streĉego. Por Injeto ne estas sole fizika malsano. Ŝi baraktas sur pli alta nivelo kontraŭ malico kaj fiaĵoj:

Injeto kuŝas delire, lamentas en halucinoj. Kun monstroj kaj draŭgoj baraktas ŝi, kaj murmuras pri lunluminoj.

Neĝego

Terura vintra ŝtormo okazas paralele kun la malsano de Injeto. La lukto inter bono kaj malbono fariĝis universala:

Sur Skarekula en roka tru', dancejo satana dum Julio, kunsidas vice trolinoj dek dusorĉantaj per raŭka ululoestingon de l' sun' en nebulo.

Se ili atingos al sia cel', por troloj estus konkero; la viv' estingiĝus treme en gel'; kaj regus mallum' sur la tero. kaj kovrus ĉion glaĉero.

La drako

Poezio estas la armilo de la poeto. Arne Garborg multe pensis pri la ekonomia stato en la kamparo. En ekonomie premaj tempoj la kamparanoj devis hipoteki siajn bienojn aŭ pagi la ŝuldojn per vendo de siaj kampoj. Garborg donas en la poemo «La Drako» ekzemplon pri la mizera stato de la etuloj en la kamparo. La

patrino en tiu ĉi poemaro estas tute senhelpa kontraŭ la potenco de la kapitalo kaj kontraŭ senindulga ekonomia sistemo en la socio. La verkisto tenas sin al la folkloro tradicio, kaj en la poemo la kreditoro ŝajnigas sin bonanima riĉulo, kiu ruze helpis la Patriron, sed Injeto vidas la veron. Li estas la drako de Infero, kiu glutas ĉion sur sia vojo.

La helpo

La folkloro popola kredo rilate al la religio, do kun kredo al transnaturaj fenomenoj, estas libere utiligata de la verkisto. La pastro havas same sorĉan kapablon kiel la subteruloj:

«Benu kaj gardu vin la Sinjor', »li diras la preĝon dian; «okulo lia prilumu vin, kaj donu li pacon sian!» —

Ĝuste la samaj vortoj estas uzataj en la norvega diservo.

Je sunsubiro

La eksteran bildon donas la sunsubiro vidata ekde la apud-mara plata lando «Jären», sed «feolando» kompreneble estas la spirita lando kiun la poeto vidas en sia animo, iu spirita celo por la vivo kaj al kiu li sopiras, iu onta hejmo por homaro kiu finvenkis en la lukto kontraŭ la Malbono.

La poemo estas mirinda flamo de koloroj. Komparu kun [Vekiĝas](#).

Printempa tag'

Paralele kun la veno de la printempo Injeto saniĝas. La temoj de la poemoj troviĝas nun en ŝia propra psikologia, ĉiutaga rilato al la okazaĵoj ĉirkaŭ ŝi. Ĉi tiu poemo estas unu el la plej belaj en la tuta poemaro:

Jen ĝermas tig', burĝon' en ŝvel', kaj suk' leviĝas sub la ŝel'. Ho, dolĉa sent'!
Vekiĝas ĝi ... Beate juna estas mi!

Sur monta vojeto

Homoj vivas sub devigo de la destino. Injeto estas destinita al paŝtado kie abundas troloj. La Kreanto donis al ŝi tian postenon. Ŝi ne povas forfuĝi de ĝi.

Ĉiu homo devas akcepti la postenon en la vivo kien la Kreanto metis ĝin malgraŭ obstakloj kaj tentoj:

Jen blokas roka mura front'por vid', anim' kaj sens'. Per griza kruta krest' de l' mont'bariĝas mia mens'.

La ĝentila knabo

Per ĉi tiu poemo komenciĝas la amrilato de Injeto. Ĝis nun Injeto luktis kontraŭ eksteraj tentoj, ekzemple riĉeco, belaj vestaĵoj, oro kaj arĝento, vivo en kastelo. De nun la persona, interna riĉeco, nome la amo, estas la temo kiu anstataŭas la trolan mondon. Kiel reagos ŝi se ŝi estos elmetata al provado rilate al tiu amo?

Sur la paŝteja monteto

La fabelanta kapablo de Injeto kreas scenejon kie luktis la gigantoj sen alia celo ol frakasadi, kaj ŝi imagas al si la batalojn, kiuj havas post si la krutejojn kiel memoraĵojn. Komparu kun «[Kanto de Gumlo](#)».

Dokka

Amo al la bovino kiun Jon karesis.

Injeto sopiras

Kortuŝe bela bildo de la familia vivo kiel ĝi realiĝas en la sopiro de Injeto kaj en la reala kampara vivo.

Mirtelejo

Humurplena bildo de paŝtista tago; kaj Injeto ĉiam fabelas eĉ por si mem.

Renkonto

Atendo kaj sopiro kvazaŭ brulas en la interno de Injeto. La sango fluas pli forte je la vido — je la miraĝo kiu ŝvebas al ŝi.

Kortuŝa bildo de renkonto inter knabo kaj knabino, kiuj ankoraŭ ne estas certaj pri la sentoj, kaj ankoraŭ ne povas paroli libere. Do la naturo devas helpi ilin: Tondro, eta ŝirmejo malvasta, sopiro, juna brako celas, kolo, premo kunen.

Kaprida danco

Poezie ritma ludo kiu redonas la viglan kuran ludon de la du en ilia unua amo.

Amo

La ama sento kiel ĝi riveligas en la koro de la knabino.

Arbar-ĝoja

Kroma ekzemplo pri la ege riĉa metriko en tiu ĉi verko. Ne oftas strofaj poemoj krom la kantoj de la gnomo, kiuj havas la saman metrikan sistemon.

Demando

Ŝercmoko pri superstiĉo kaj skeptikismo. Samtempe vorta lukto inter edzo kaj edzino. Ne estas malfacile kompreni, ke estas viro kiu verkis la poemon.

Bovin-voko

Balance kanta ritmo en la versoj.

Malbona tago

La unua provo ĉu la amo estas sincera ambaŭflanke.

Ĉe la paŝteja rojo

Pro la perfido Injeto estas nun malforta kaj matura por esti tentata de la malbonaj estaĵoj. La huldro kvazaŭ svatas por sia frato. Kaj ŝi informas, ke Injeto estos trance portata sur la monton «Skarekula», kie «ni», nome la subnaturaj estaĵoj, festenos Antaŭ-Julon.

Notu la molan transiron al alia ritmo kaj al alia temo: Dolĉe kiel plor' ...

Rimarku, en la lasta strofo, kiel la poeto utiligas naturan fenomenon por glate gliti de superstiĉa aŭ sonĝa stato al vekita, tiel ke oni ne povas scii kio estas sonĝo kaj kio vero. Komparu ankaŭ la finan strofon de la poemo «[Antaŭsciigo](#)».

SUR TROLA MONTTO

«Skarekula» korespondas al la germana «Brocken» (norvege: «Blokksberg»).

Vekiĝas

El radioj fariĝas enorma halo sur la monto kie kolektiĝas la regatoj de Satano.

En la sekvaj poemoj Arne Garborg montras en la satana regno tion, kion li detale vidas en la vera norvega mondo. Li akre kritikas la politikajn asociojn, la praktikatan religion kaj socian konduton.

Troldanco

Buĉado de infanoj fare de patrino kaj pretigo al la patro por manĝo estas folkloraj fabeloj kiu unue okazis en la Edda kantoj kaj en la sagao pri Gudrun kaj Atle en Snorra Edda. Eble Arne Garborg aludas al la sorto de la malsuperuloj en la socio, ĝuste kiel li faras en la poemo «[La Drako](#)».

Montaj troloj

Trola versio de kunvenoj en urba asocio. Arne Garborg estis kritikema al la moralo kaj vivkonceptoj de urbanoj. «Ŝveba danco» estas ironia esprimo pri la valso, kiu venis de eksterlando kaj fariĝis kutima danco en la kunvenoj en la urboj. Ĝi estas kontrasto al la vigla norvega danco «springar» («saltodanco»). La poemo estas akra kritiko kontraŭ la formo de kulturo en la ĉefurbo.

Gruntejo

Sterila restaĵo de la antikva kulturo.

«olda Gumlo-kantaro».

— imito de la Edda-kantoj. Kanto signifas ĉi tie deklamon.

Kanto de Gumlo

Krom ritmo la kanto havas en la norvega lingvo ankaŭ aliteracion, kio oftas en la tuta poemaro, tamen ĝi estas malfacile redonebla en Esperanto, ĉar tio kondukus al tro da artefaritaĵoj. Aliteracio postulus vortojn kun akcento sur la unua silabo.

La kanto donas vizion super la historio ekde la tempo kiam la naturaj fortoj regis sub la nomo de «gigantoj». La naturaj fortoj agas sencele. Do la «luktoj» inter la «gigantoj» fariĝas nur por la celo de lukto. Neniu kultura vivo:

«Tempo staris / Ĉio mutis.»

— Antaŭ la ekzisto de vivo.

«Kreskis Alvo»

— la unua viro.

«Venis Azoj.»

— la norenaj dioj; tio signifas kulturo; tempo de la ĝermanaj popolaj migradoj (350–550 de nia erao).

«Kovris vilaĝojn sub gruz' kaj sablo.»

— La «jotuno» devis kaŝi sin en la rokoj, sed foje li elvenis por kaŭzi naturkatastrofojn.

«Degenerisparencaro. Krevis sub suno. Ekŝtoniĝispro di-martelokaj blanka kruco.»

— komparu kun «Sur paŝteja monteto».

«Nun la gnomoj / estras la regnon.»

— pikvorto al la estrantoj de la socio je la tempo de la aŭtoro mem. Kritiko kontraŭ la registaro kaj la ministroj.

«nigraj libroj»

— Komparu kun «Sorĉisto kun Vergo».

LA GRANDA LUKTO

La finaj kaj plej fortaj tentoj prezentas sin al Injeto, nome tiuj ligitaj al la intimaj sentoj kaj deziroj pro la perfidita amo. Paralele okazas ŝanĝoj en la naturo. Injeto metiĝas en elekton inter silenta akcepto de la sorto kaj venko pere de malico.

Ŝi vekigas

La spiritaĵoj en Injeto en formo de la vizio de Lizabet', ŝia reaperanta fratino kaj gard-angelo, ne cedas al la tentoj.

Peza momento

Neniu indulgo estas por Injeto. Ŝi devas vidi la knabon rajdi al nupto kun alia knabino. Tiel ŝi metiĝas al la fina provo. Ŝi volas morti, kaj renkonti lin survoje kuŝante en la nigra ĉerko. Tiel ŝi venĝus sin vekante lian konsciencon. Do Injeto ankoraŭ ne purigis malicon el sia koro, kaj sekve ankoraŭ ne estas matura por servo al la Kreanto.

En «Blua-Monto»

La belaj subterulinoj ofertas al ŝi belecon, riĉecon kaj eternan forgeson. Tamen tra la suferoj Injeto evoluis al supera homo. Ŝi rifuzas fuĝi de sia sorto. La suferoj kiujn ŝi spertis dum ĉi tiu tempo, estas ŝia vivo, kaj ŝi ne volas forgesi ilin, ĉar tio signifus forigi sin mem.

«Ĉu vi estingos afliktan flamon?— Por nenio perdu mi mian amon.»

Libera

Injeto estas nun malpleniginta la kalikon, kaj estas preta por servo al la Kreanto kune kun la «muza de saĝec'». Tiu servo estas priskribita en la dua volumo de la poemaro, «En Infero».

LOKO DE «LA MONTARINO» EN LA NORVEGA BELETRISTIKO

Arne Garborg naskiĝis kamparano. Li volis fariĝi verkisto, kaj terkulturado ne logis lin. La sola vojo el kampara vivo estis tra instruista lernejo. Li havis brile klaran cerbon kaj plenumis la ekzamenon. Li transloĝiĝis al la ĉefurbo, kie li studis en la universitato. Li aliĝis al la radikalaj verkistoj en la sepdekaj kaj okdekaj jaroj de sia tempo, kiuj verkis laŭ la naturalismaj ideoj. En la naŭdekaj jaroj li forlasis tiun tendencon. La spirita vivo de homo fariĝis grava por li kiel filosofo kaj verkisto. Li tute forlasis la naturalisman tendencon en la literaturo, kaj vivkoncepto fariĝis la

vortoj de Sankta Mateo (16²⁶): «Ĉar kiel profitus homo, se li gajnus la tutan mondon kaj perdus sian animon.» («Kondamnita»).

Laŭ tiu tendenco li verkis plurajn romanojn kaj la grandan teatraĵon «La instruisto» (Läraren), en kiu li sekvis la ideojn de Leo Tolstoj, kaj tiel li daŭrigis dum la resto de sia vivo.

«La Montarino, Injeto, la Vizianto» fariĝis lia plej ŝatata verko. Granda nombro de la poemoj estas verkita laŭ popolaj melodioj. Edvard Grieg, faris melodiojn jam kiam Arne Garborg vivis. Kirsten Flagstad frue akceptis ilin por siaj koncertoj. Hodiaŭ kantistinoj prezentas tiujn poemojn laŭ sia propra maniero per memfaritaj melodioj. Ili akceptas la defion kanti ilin tiel kiel ili en iliaj animoj travivas la amhistorion de Veslemey.

La trola parto de la poemaro ne estas tiel ŝatata. Tamen estas tiu, en kiu Arne Garborg donis sian universalan vivkoncepton kaj ankaŭ siajn opiniojn pri la socia, morala, politika kaj ekonomia stato inter la homoj je sia propra tempo. La homo estas tirita en aspekte eternan lukton inter Bono kaj Malbono, kaj tiuj ecoj havas lokon en lia propra animo. Tiuj ecoj aperigas sin en la ĉiutaga vivo kaj postulas ĉiutagan lukton kontraŭ Malbono; kaj la ĉiutagaĵoj respegulas universalan staton. Por montri tion Arne Garborg elektis la folkloran mondon kun ties ecoj, kiujn reprezentas multspecaj trolaj estaĵoj, kiaj ja estas la multspecaj animaj statoj de la homoj.

La titolo de la dua volumo de tiu ĉi poemaro (En Infero) montras ke Arne Garborg intencis montri al la homaro vojon al savo el Malbono pere de Veslemey, Injeto. Sed unue ŝi devis pruvi ke ŝi estas digna por tiu alta tasko. Ŝi devis elradikigi el sia animo ĉiun eron de malico antaŭ ol esti matura por servo por la Kreanto. Tiel ŝi reprezentas la homon, aŭ alie dirite Nin Mem.

«La Montarino» estas tradukita island-lingven 1906 sub la nomo «Huliðsheimar» kaj svedlingven 1916 sub la nomo «Ingrid Sierskan».

*** END OF THE PROJECT GUTENBERG EBOOK LA MONTARINO: LA POEMARO PRI
VESLEMEY ***

Updated editions will replace the previous one—the old editions will be renamed.

Creating the works from print editions not protected by U.S. copyright law means that no one owns a United States copyright in these works, so the Foundation (and you!) can copy and distribute it in the United States without permission and without paying copyright royalties. Special rules, set forth in the General Terms of Use part of this license, apply to copying and distributing Project Gutenberg™ electronic works to protect the PROJECT GUTENBERG™

concept and trademark. Project Gutenberg is a registered trademark, and may not be used if you charge for an eBook, except by following the terms of the trademark license, including paying royalties for use of the Project Gutenberg trademark. If you do not charge anything for copies of this eBook, complying with the trademark license is very easy. You may use this eBook for nearly any purpose such as creation of derivative works, reports, performances and research. Project Gutenberg eBooks may be modified and printed and given away—you may do practically ANYTHING in the United States with eBooks not protected by U.S. copyright law. Redistribution is subject to the trademark license, especially commercial redistribution.

START: FULL LICENSE